

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO


44a jarkolekto, februaro 2023/02

**Leteroj el Moskvo**

**Kataro: ruĝa karto**

**Bronza mano prilumas  
la praeŭskan lingvon**

**Fanatikula voĉdonado  
en Brazilo**





# En tiu ĉi numero

FOTO DE LA KOVRILLO: ISAAC FONTANA / SHUTTERSTOCK.COM

	<b>el diplomatia vidpunkto</b>	
	<b>AFRIKO</b>	<b>3</b>
	➤ Ĉu ŝanĝo de landlimoj? Apenaŭ.	
	<b>aktuale</b>	
	<b>TAGLIBRO DE L' MILITO ...</b>	<b>5</b>
	➤ Leteroj el Moskvo	
	<b>politiko</b>	
	<b>BALTIO</b>	<b>7</b>
	➤ Ĉu televido prosperas kaj fiaskas?	
	<b>VENEZUELO</b>	<b>10</b>
	➤ De revo al realo	
	<b>#LULA2022</b>	<b>11</b>
	➤ Fanatikula voĉdonado	
	<b>moderna vivo</b>	
	<b>MILITO EN UKRAINIO</b>	<b>13</b>
	➤ „Ĉesigu tuj la pafadon!”	
	<b>MIGRADO</b>	<b>15</b>
	➤ Transpasi Manikon per boatoj	
	<b>EKOLOGIO</b>	<b>16</b>
	➤ Armenaj skribiloj kun semoj	
	<b>MIGRADO</b>	<b>17</b>
	➤ Venezuelaj infanoj en panama ĝangalo	
	<b>medio</b>	
	<b>ESTONTECO</b>	<b>19</b>
	➤ Klimatŝanĝo, marbordaj inundoj kaj eventualaj solvoj	
	<b>JURO</b>	<b>20</b>
	➤ Malliberejo pro ekocido	
	<b>ENERGIO</b>	<b>21</b>
	➤ Novaj sunpaneloj sen PFAS	
	<b>scienco</b>	
	<b>NUTRADO</b>	<b>22</b>
	➤ Ju pli da vitaminoj, des pli bone. Ĉu?	
	<b>KUBO</b>	<b>23</b>
	➤ Ĉu zebrofiŝoj kuracos neŭrologiajn malsanojn?	
	<b>ESEO</b>	<b>24</b>
	➤ La mistera tria viro	
	<b>ekonomio</b>	
	<b>FUTBALO</b>	<b>25</b>
	➤ Kataro: ruĝa karto	
	<b>lingvo</b>	
	<b>EGIPTIO</b>	<b>27</b>
	➤ Ne tute mortis la antikva egipta lingvo	
	<b>EŬSKIO</b>	<b>29</b>
	➤ Bronza mano prilumas la praeŭskan lingvon	
	<b>libroj</b>	
	➤ Matematika inspiro, sed mallerta satiro	<b>30</b>

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.be

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 43a jar-kolekto; aperas principe la 15an de la antaŭa monato, escepte de aŭgusto.

MONATO havas 159 korespondantojn kun kunlaborkontrakto en 47 landoj kaj abonantojn en 64 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represo kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; MONATO estas eldonata en tradicia papera versio kaj bite en la formoj PDF, ePub, Kindle kaj en voĉlegita versio; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de la eldonejo.

### eldonejo:

Vlaamse Esperantobond v.z.w.  
(Flandra Esperanto-Ligo),  
Lange Beeldekenstraat 169,  
B-2060 Antwerpen, Belgio;  
telefono: + 32 3 234 34 00;  
retpoŝto: eldonejo@monato.be;  
Skype: fel-monato;  
BE0419 028 122 -  
RPR Antwerpen.

### abontarifo:

La abontarifo varias laŭlande.  
Vd. en MONATO 2022/11, p. 31  
kaj en monato.be/tarifoj.php  
aŭ petu ĝin de  
eldonejo@monato.be.

retejo: [www.monato.be](http://www.monato.be)



### socialj retejoj:

- Twitter: @FEL\_Antwerpeno
- Facebook: [facebook.com/revuo.Monato/](https://facebook.com/revuo.Monato/)
- Telegramo: [monato.telegramo.org](https://monato.telegramo.org)
- Youtube: [www.monato.be/jutubo](https://www.monato.be/jutubo)

### honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

### ĉefredaktoro:

Paŭl Peeraerts.

### reviziantoj:

Edmund Grimley Evans,  
Jens S. Larsen, Rob Moerbeek,  
Brian Moon, Fransoazo Noireau,  
Manolo Parra, Andrej Peĉenkin,  
Anna kaj Mati Pentus,  
Antônio W. de Ruijter.

### faktokontrolanto:

André Ruysschaert

### redakcia sekretario:

Paŭl Peeraerts.  
Rete: [redakcio@monato.be](mailto:redakcio@monato.be).

### grafiko:

Zep Armentano, Ferriol Macip

### redaktoroj:

- **Arto:** Aleksej Salomatov, Moskvo, [arto@monato.be](mailto:arto@monato.be).
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Belgio, [ekonomio@monato.be](mailto:ekonomio@monato.be).
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Historio:** Trevor Steele, Aŭstralio, [historio@monato.be](mailto:historio@monato.be).
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Aŭstrio, [hobio@monato.be](mailto:hobio@monato.be).
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, Britio, [komputado@monato.be](mailto:komputado@monato.be).
- **Leteroj:** Paŭl Peeraerts, Belgio, [leteroj@monato.be](mailto:leteroj@monato.be).
- **Libroj:** [libroj@monato.be](mailto:libroj@monato.be).

Noto: Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro propra-  
iniciate. La kunlaborantoj  
ricevos la recenzopetojn kaj la  
librojn de la eldonejo.

- **Lingvo:** Roberto Pigro, Kipro, [lingvo@monato.be](mailto:lingvo@monato.be).
- **Literaturo:** Trevor Steele, Aŭstralio, [literaturo@monato.be](mailto:literaturo@monato.be).
- **Medio:** Krys Williams, Britio, [medio@monato.be](mailto:medio@monato.be).
- **Moderna vivo:** Norberto Díaz Guevara, Kubo, [moderna\\_vivo@monato.be](mailto:moderna_vivo@monato.be).
- **Politiko:** Massimo Ripani, Italio, [politiko@monato.be](mailto:politiko@monato.be).
- **Scienco:** Roberto Pigro, Kipro, [scienco@monato.be](mailto:scienco@monato.be).
- **Spirita vivo:** Alberto García Fumero, Kubo, [spirita\\_vivo@monato.be](mailto:spirita_vivo@monato.be).
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Aŭstrio, [turismo@monato.be](mailto:turismo@monato.be).

AFRIKO

# Ĉu ŝanĝo de landlimoj? Apenaŭ.



Julius HAUSER

WEAD / SHUTTERSTOCK.COM

Dum la someraj monatoj en 2022 kelkaj mondaj ĵurnaloj publikigis tre mallongan informon, ke la reprezentantoj de du afrikaj ŝtatoj, Kameruno kaj Respubliko Kongo, konsentis restarigi sian 100-jaran komunan landlimon por redukti disputojn en iuj limaj komunumoj. Kameruno jam faris similajn limajn interkonsentojn kun najbara Gabono en majo kaj kun Centafrika Respubliko en junio de tiu jaro. Kvankam ĉi tiu informo ne vekis la intereson de la monda publiko, ĝi meritas pli proksiman klarigon en pli vasta diplomacia kaj historia kunteksto.

## Koloniado de Afriko

La supre menciita gazetara informo povas elvoki ĉe leganto la demandon, ĉu ekzistas eblo de revizio kaj ŝanĝo de ekzistantaj landlimoj kaj kreado de novaj afrikaj ŝtatoj. Oni rimarku, ke plej multaj el la hodiaŭaj ŝtatlimoj de afrikaj landoj estas rekta heredaĵo de la koloniado de Afriko: ili estas artefaritaj, geometriaj kaj en multaj okazoj ne respektas geografiajn, etnografiajn, demografiajn, reli-

giajn kaj aliajn diferencojn. Ili estis kreitaj laŭ la decido de la iamaj eŭropaj koloniaj potencoj, senrespekte de la historia evoluo sur tiu kontinento.<sup>1</sup>

1. Tie ĉi en diplomatio kaj profesia literaturo estas uzata la termino *la disdivido de Afriko*. Vidu ankaŭ la Berlinan Konferencon, kiu okazis en la jaroj 1884 kaj 1885. Ministroj pri eksterlandaj aferoj de 14 landoj dividis inter si la afrikan kontinenton. Ekzemple en 1870 la eŭropanoj regis nur 10 % de la teritorio de Afriko, en 1900 jam 90 %.



La plej multaj el la hodiaŭaj ŝtatlimoj de afrikaj landoj estas rekta heredaĵo de la koloniado de Afriko

Kiam oni determinis la novajn landlimojn de afrikaj ŝtatoj en la pasinteco, oni uzis la latinan principon *uti possidetis* (libera traduko: kiel oni posedas), laŭ kiu la limoj inter novkreitaj ŝtatoj kopias la administratajn aŭ aliajn similajn limojn kreitajn de la antaŭa potenco. Tiu principo estis aplikata ankaŭ, ekzemple, dum la divido de Jugoslavio.

## Netuŝeblo de landlimoj

La netuŝeblo de la ekzistantaj limoj de afrikaj landoj estis ankaŭ konfirmita ĉe la internacia konferenco de la (nun iama) Organizaĵo por Afrika Unueco<sup>2</sup> en 1964,

2. La Organizaĵo por Afrika Unueco estis fondita la 25an de majo 1963. Ĝi estis abolita la 8an de junio 2002, kaj ĝin anstataŭis la Afrika Unio).

kiu deklaris en sia rezolucio 16 (I), ke ĉiuj membroŝtatoj devas respekti la limojn ekzistantajn post la atingo de sia nacia sendependeco.

La diplomatia praktiko ĝis nun montras, ke la ebloj ŝanĝi la nunajn limojn estas tre limigitaj. Temas nur pri esceptaj kaj specifaj eventoj okaze de kreado de novaj ŝtatoj, kiel en lastaj jardekoj la proklamado de sendependeco de Eritreo en 1993 aŭ la kreado de Suda Sudano en 2011.

## Kameruno: nur restarigo

La hodiaŭa Kameruno fariĝis germana kolonio en 1884, kaj ĝia teritorio estis dividita post la unua mondmilito inter Francio



De la nova markado de la landlimoj kun najbaraj landoj Kameruno atendas, ke ilia preciza markado reduktos la ekzistantajn streĉiĝojn, rivalecojn kaj lokajn armitajn konfliktojn

kaj Britio sub la mandato de la Ligo de Nacioj. Tie ne temas pri nova geografia ŝanĝo de landlimoj. Temas nur pri mana kaj administra restarigo de la ekzistantaj landlimoj. Multaj komunaj limŝtonoj kaj aliaj limmarkiloj kun Respubliko Kongo estis detruitaj per erozio kaj inundoj. Iuj limmarkiloj estis eĉ intence detruitaj fare de lokaj limkomunumoj aŭ tute malaperis dum la tempo.

## Kontraŭ perforto kaj ŝtelĉasado

De la nova markado de la landlimoj kun najbaraj landoj Kameruno atendas, ke ilia preciza markado reduktos la ekzistantajn streĉiĝojn, rivalecojn kaj lokajn armitajn konfliktojn

en iuj landlimaj regionoj, kie komunumoj batalas pri naturaj rimedoj, precipe arbaroj, plantoj kaj sovaĝaj bestoj. Simple kaj mallonge, la nova limmarkado de nuntempaj landlimoj devus certigi pacon kaj favoran duflankan disvolviĝon de la du najbaraj kaj amikaj landoj. ■



**Julius HAUSER** estas emerita ambasadoro de Slovakio. Lia tuta profesia vivo estas ligita kun diplomatio. Li laboris en diversaj altrangaj postenoj en la ministrejo pri eksterlandaj aferoj kaj eksterlande.

# La KancerKliniko

## Politika Kultura Skandalema Ajnista

### 4 numeroj jare + La Krom

---


lkk@free.fr

---

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Gennadij Turkov, Russ Williams, Stéphan Brault, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, Lilia Ledon, N. Xil Carvalho, Robert Molimard, Claude Gerlat, Trevor Steele, Ian Fantom ktp.

---

Abono: 27,50 € (ekde 16 en kelkaj landoj)  
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris  
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



Spektu la filmetojn  
pri MONATO en  
[www.monato.be/jutubo](http://www.monato.be/jutubo)

TAGLIBRO DE L' MILITO ...



# Leteroj el Moskvo



A. A.  
Moskvo

NADIIYA / SHUTTERSTOCK.COM

## Moskvo, la 1an de novembro

Antaŭ ĝuste unu jaro rusaj oficistoj ellaboris novajn entombignormojn. La novaĵo estis tiam tre sensacia, ĉar la nova regularo enhavis ankaŭ indikojn pri la normoj por entombigoj en pactempo kaj milita tempo kaj regularoj por amastomboj estis evoluigitaj. Krome oni ellaboris apartajn normojn por la entombigoj de personoj, kiuj mortis pro radioaktiveco.

Antaŭ unu jaro neniu povis kredi je amastomboj pro nukleaj atakoj. Tiam oni ridis pri tiu temo. Tamen, kiel evidentiĝas nun, jam en novembro de 2021 Rusio planis atakon kaj antaŭvidis grandan nombron da viktimoj, ankaŭ pro radiado.

## Moskvo, la 15an de decembro

La nuna ideo de mobilizado estas ligi absolute ĉiujn loĝantojn al malamo al Ukrainio kaj la mondo. La procezo daŭras, laŭ mia opinio, sufiĉe sukcese. Ĉe ĉiuj kvin televidkanaloj, el diversaj anguloj, oni instigas al malamo al la mondo, precipe al Usono, Ukrainio, Anglio kaj Japanio (jes, ankaŭ Japanio estas en ĉi tiu listo pro la Kurilaj Insuloj kaj aliaj kialoj<sup>1</sup>). Oni aŭdas ĉiajn kuraĝigojn kaj amasan subtenon al la milito, dum ekzemploj de rezisto kaj protesto estas kaŝitaj, subpremitaj.

1. Pri la Kurilaj Insuloj aperas pli da klarigoj en MONATO 2021/12, p. 14. (red.)



Konato mia, viro, kun vasta milita sperto, skribis, ke li interparolis en la armea registra kaj enlistiga oficejo. Se li ne mem iros al la fronto, ili sendos lian studentan filon

La mobilizitaj viroj havas la iluzion, ke ili estas multaj, ke ekzistas miliono da ili, kiuj volas batali, kaj ke per tia amaso ili dispremos iun ajn. Komence ili timas iri al la fronto, sed ĝis ili alvenos tien, ili vidos milojn da samaj viroj vestitaj en kamuflaĵo kun maŝinpafiloj, tankoj, pafiloj, kaj se ilia analiza pensado ne estas evoluigita, ili ne plu timas.

## Sen respondo

Konato mia, viro, kun vasta milita sperto, skribis, ke li interparolis en la armea registra kaj enlistiga oficejo. Se li ne mem iros al la fronto, ili sendos lian studentan filon. „Mi iros,” li skribis. Mi demandis, kial li estas tiel certa kaj ĉu en la lando de mensoguloj lia filo ne estos

prenita post li. Li ne respondis.

Virino, 60-jara, instruisto pri sporto: „Hodiaŭ, alia viro en nia familio prepariĝas por foriri.” – Mi: „Kia hororo, haltigu lin pro lia vivo kaj konscienco!” – Ŝi: „La honoro de oficiro ne permesos al li kaŝiĝi en la arbustoj, li batalos!” – Mi: „La honoro de oficiro estas ne mortigi civilulojn en alia lando!” Ankaŭ ŝi haltigis la korespondadon.

## Ukrainoj volas detrui nin

50-jara konatino mia skribis: „Por esti objektiva vi devas viziti Ukrainion. Ili malamas nin ĉiujn kaj volas detrui nin. Mi estis tie antaŭ multaj jaroj, mi estis tie kaj mi konas ilian agreseman sintenon.”

Miaj interparolantoj en Rusio ofte timas longe pensi, dubi. „Rusio kaj via familio en Ukrainio estas en danĝero”, jen la ĉefaj vortoj de ili, negrave ĉu tio kongruas kun la vero aŭ ne. Sed kiaj pruvoj estas de usona kaj ukraina agreso kontraŭ Rusio? (Krom tiuj prezentitaj en ŝtate regataj rusaj televidkanaloj.) Kion signifas „Usono batalas sur la teritorio de Ukrainio kaj mortigas ukrainojn”? Kiel precize

”

Kiun rajton havas ordinaraj rusoj juĝi, kio okazas en alia lando, kaj subteni decidon pri la senigo de vivo de al ili nekonataj fremduloj, apogante sin nur sur unuflankaj informoj? Kiel ili respondecas pri siaj eraroj? Kiel ili pagos por sia erara opinio?

ĉi tio manifestiĝas, kaj kiom da ukrainoj mortis pro la agoj de usonaj soldatoj, kaj kiom pro tiuj de la rusoj? Kaj kion faris kaj faras rusaj trupoj sur la teritorio de najbara ŝtato?

Kiun rajton havas ordinaraj rusoj juĝi, kio okazas en alia lando, kaj subteni decidon pri la senigo de vivo de al ili nekonataj fremduloj, apogante sin nur sur unuflankaj informoj? Kiel ili respondecas pri siaj eraroj? Kiel ili pagos por sia erara opinio?

## Kontraŭrusa veneno!

Iuj ĵus amase dissendis novaĵon pri sekretaj ukrainaj biologiaj laboratorioj, en kiuj estas evoluigita veneno, kiu mortigas nur rusajn homojn. Mi akre riproĉis kelkajn el tiuj ĉi stultuloj, kaj ili eksilentis, sed ju pli stulta kaj monstra la akuzo, des pli ĝi populariĝas inter homoj, kiuj ne estas pretaj pensi. Kaj estas multaj el ili, tro multaj.

Mi demandis kelkajn samlandanojn, kial la plej patriota propagandisto Vladimir Solovjov ricevas grandegan salajron pro sia televida laboro kaj havas plurajn grandegajn feridomojn ĉe la itala lago Como. Kaj tiam miaj plej

bonaj interparolantoj necerte deklaras, ke „eble li bezonas ripozi”.

## Ne hospitaloj, sed daĉoj

Kial Putin kaj liaj ministroj, kiuj tiel impete defendas Rusion, investis miliardojn da dolaroj el la vendo de rusa petrolo ne en hospitaloj, ne en lernejoj, vojoj, malriĉuloj, sed en siaj daĉoj, aŭtoj, aviadiloj, geamantoj kaj infanoj (kiuj ĉiuj ne loĝas en Rusio). Ĉiuj rusoj konas la grandecon de burokratiaj kortegoj, ili konas la salajrojn de deputitoj kaj la malnoblan sintenon al ordinaraj homoj. Ĉiuj rusianoj jam estis en ĉifonaj malsanulejoj. Ĉiuj scias, kiom multekoste estas sendi infanon al lernejo, kaj ke eĉ veteranoj de la Granda Patriota Milito ricevas magran suplementon al eta pensio.

Ĉiuj scias ĉi tion. Kaj kiam mi demandas, kiel okazis, ke la samaj homoj regas dum 20 jaroj, kaj estas miliardoj da dolaroj por subaĉetaĵoj kaj militoj, sed ne por traktado de infanoj kaj digna maljuneco por maljunuloj, miaj interparolantoj eble ekpensas. Sed ili ne ĉesas esti subtenantoj de la milito ... ■



Babilu ankaŭ vi kun ni en Telegramo  
[monato.telegramo.org](https://monato.telegramo.org)

BALTIO

# Ĉu televido prosperas kaj fiaskas?



LAST

korespondanto de MONATO en Litovio

*La Sendependa televidkanalo „Pluvo” traktas agadon de la rusia opozicio kaj la protestojn okazantajn en la lando.*



AOKAB

La rusia invado en Ukrainio multe ŝanĝis la vivon de rusianoj mem, precipe se ili ne favoras al la politiko de sia prezidanto Vladimir Putin. Multaj opoziciuloj estis enskribitaj en la liston de tiel nomataj „eksterlandaj agentoj”.

En 2008 en Moskvo startis sendependa televidkanalo „Pluvo” (ruse *Dožd*, angle *TV Rain*), kiu en siaj programoj traktas agadon de la rusia opozicio kaj la protestojn okazantajn en la lando. En 2020 ankaŭ ĝi aperis en la rusia listo de „eksterlandaj agentoj”, kaj post la rusa invado al



La televidstacio „Pluvo” translokiĝis al la najbara Latvio kaj komencis tie elsendi en julio 2022

Ukrainio, en marto 2022 ĝi ĉesigis sian agadon en Rusio. Tiumomente ĉiuj ĉefaj sendependaj amaskomunikiloj en Rusio fermiĝis pro subpremaj registaraj agoj. Ankaŭ la opozicio signifreduktiĝis en la lando, ĉar multaj estis devigitaj fuĝi eksterlanden aŭ estis malliberigitaj. Laŭleĝe, dis-



La programprezentisto Aleksej Korosteljov lanĉis instigon proponi informojn pri servokondiĉoj de rusiaj soldatoj kaj esprimis esperon, ke la televidkanalo povos helpi plurajn soldatojn.

vastigo de malfavoraj informoj kontraŭ la rusa armeo povus kaŭzi punon – ĝis 15 jaroj en malliberejo.

La televidstacio „Pluvo” translokiĝis al la najbara Latvio kaj komencis tie elsendi en julio 2022.

## Nigra decembro

Komence de septembro el Latvio venis neatendita novaĵo: Konsilio de Latva Nacia Elektronika Amaskomunikilaro (NEPLP) iniciatis la aferon de administra miskonduto kontraŭ la sendependa rusa televidstacio „Pluvo”, kiu havas latvan licencon.

La malkontenton de latvaj aŭtoritatuloj kaŭzis la fakto, ke en la programero „Ĉi tie kaj nun” (ruse: „Zdes i seĉas”) la programprezentisto Aleksej Korosteljov lanĉis instigon proponi informojn pri servokondiĉoj de rusiaj soldatoj kaj esprimis esperon, ke la tele-

vidkanalo povos helpi plurajn soldatojn, ekzemple, disponigante „ekipaĵon kaj esencajn necesojn ĉe la fronto”. La estro de la latva instanco, Ivars Āboliņš, indikis, ke tio estas afero de nacia sekureco de Latvio, kiu estos solvita laŭ la leĝo. Tiu fakto povus esti la tria serioza malobservo, kiun „Pluvo” faris dum la lastaj monatoj. Āboliņš aldonis, ke pro tri gravaj malobservoj de latvaj amaskomunikilaj reguloj la konsilio povas nuligi la elsendlicencon por la rusa televido.

Tiĥon Džjadko, ĉefredaktoro de „Pluvo”, klarigis en *Twitter*, ke la televidkanalo ne okupiĝas pri liverado de helpo al la rusa armeo kaj ke la vidpunkto de la prezentisto estas misinterpretita. La vera intenco, laŭ Džjadko, ne estis zorgi pri helpo al la rusa armeo, sed kolekti informojn pri la krimoj de la rusia registaro kaj la armeo. Baldaŭ la ĵurnalistino Jekaterina Kotrikadze deklaris en la programo „Ĉi tie kaj nun”, ke „Pluvo” decidis maldungi la televidan prezentiston Korosteljov,

”

Konsilio de Latva Nacia Elektronika Amaskomunikilaro (NEPLP) monpulis je 10 000 eŭroj la televidstacion, kiu nuntempe estas bazita en la latva ĉefurbo Rigo, pro tio, ke la programoj ne estas tradukitaj en la latvan, Krimeo estis prezentita sur la mapo kiel parto de la rusia teritorio, kaj unu televida programestro nomis la rusan armeon „nia armeo” kaj eble esprimis subtenon al ĝi.

kiu parolis pri subteno de la rusa armeo.

Rezulte NEPLP monpulis je 10 000 eŭroj la televidstacion, kiu nuntempe estas bazita en la latva ĉefurbo Rigo, pro tio, ke la programoj ne estas tradukitaj en la latvan, Krimeo estis prezentita sur la mapo kiel parto de la rusia teritorio, kaj unu televida programestro nomis la rusan armeon „nia armeo” kaj eble esprimis subtenon al ĝi. Konklude, Latvio decidis nuligi la licencon de la sendependa rusa televidkanalo, klarigante, ke tiu decido estas farita post taksado de la malobservoj.

La ĉefredaktoro Džjadko reage diris, ke oni ankoraŭ pripensas, ĉu apelacii kontraŭ la nuligo de la licenco, ĉar „Pluvo”, dum la elsenda malpermeso validos en Latvio, ne estos videbla ankaŭ en aliaj landoj de Eŭropa Unio.

La ministro pri internaj aferoj Kristaps Eklons enmetis Korosteljov en la tiel nomatan nigran liston. Laŭ ĉi tiu decido, la ĵurnalista ne rajtas eniri la teritorion de Latvio. Li loĝas en Kartvelio kaj ne havas latvan vizon aŭ loĝpermeson, do la aŭtoritatoj ne povas procesi lin.

La estro de la Latva Oficejo pri Civitaneco kaj Migraj Aferoj, Maira Rose, diris, ke „Pluvo” devas klarigi, kion faros ĝiaj dungitoj, kiuj estas en la lando kun laborvizioj, post kiam la kanalo estas senigita de sia



elsenda licenco. Ŝi aldonis, ke perdo de elsenda licenco ne signifas, ke la dungitoj de televidkanalo havantaj viziojn perdis la rajton resti en Latvio.

## Pluraj tendaroj

Post kiam Latvio decidis nuligi la licencon de la sendependa rusa televidkanalo „Pluvo”, la publiko dividiĝis en plurajn tendarojn.

„La nekomprenbla kaj maltrankviliga” decido nuligi la licencon de la sendependa rusa televidkanalo „Pluvo” funkcia ekzile en Latvio estas malinda je eŭropa lando, kiu defendas gazetaran liberecon, diris la internacia grupo pri rajtoj de amaskomunikiloj „Raportistoj sen landlimoj” (RSF).

„Ĉi tiu cenzuro de sendependa rusa amaskomunikilaro subfosas klopodojn kontraŭbatali kremnan propagandon, kiu estas unu el la celoj de la latva registaro”, diris la estrino de la Orient-Eŭropa kaj Centra Azia fako de RSF Jeanne Cavalier. „Se ĉi tiu decido rilatis al la zorgoj de la Ŝtata Sekureca Servo pri ‘minacoj al la nacia sekureco kaj publika ordo’, kiel dirite en la oficiala deklaro de la latva instanco, la prizorganto devas klare prezenti la kialojn”, ŝi emfazis.

Fama iama rusia televida ĵurnalisto, kiu loĝas en Ukrainio de pli ol dek kvin jaroj, kaj kiu post la milito komencis dissendi siajn proprajn programojn en

Interreto, Jevgenij Kiseljov, komentante la skandalajn komentojn de la ĵurnalisto de „Pluvo”, diris, ke tiu ĉi evento elstarigas la fundamentan problemon de la rusiaj opoziciaj ĵurnalismo kaj socio, kaj de politikistoj kontraŭstarantaj al la politiko de Kremlo: „Kiuj ni estas ĉi-momente? Kiucele ni laboras? Ili bezonas solvi la problemon de memidentigo. En tia situacio, kiam Rusio provokas freneze brutalan, malhumanan, sangan militon kontraŭ Ukrainio, Rusio povas kuraĝe esti nomata la agresa lando. Ja malabee al multaj internaciaj interkonsentoj, ĝi faras ne nur militajn krimojn, sed ankaŭ balaas ukrainajn urbojn kaj vilaĝojn de la tersurfaco. Tial rusianoj, kiuj troviĝas ekzile en Eŭropo aŭ aliaj landoj, aŭ kiuj ne povas forlasi Rusion, devas tamen sendube decidi, ĉu ili estas subtenantoj de Ukrainio, ĉu ili volas, ke Vladimir Putin malvenku ĉi tiun militon, aŭ ĉu ili provas sidi sur du seĝoj samtempe – kvazaŭ ĉio, kion Putin faras, estus malĝusta, sed aliflanke estas domaĝe pro niaj mobilizitaj junuloj.”

Kiseljov estas ankaŭ konvinkita, ke rusiaj ĵurnalistoj nuntempe havas nek profesion nek moralan rajton disvastigi senhontajn mensogojn kaj propagandon kiel supozeble objektivan informon. Laŭ Kiseljov tio estas io krima. Li aldonis, ke se juĝi laŭ tio, kion parolis programprezentisto,

eblas konkludi, ke tiu ne havas pozicion pri la milito en Ukrainio, ke tiu ne havas moralajn valorojn por taksu tiujn rusojn, kiuj militas, kaj ke estas absolute neniu maniero por pravigi ilin. „Eble hejme en la kuirejo, oni povas kompati ilin kiel homojn, eble eĉ silente forviŝi larmon, sed publike peti kompaton por ili estas simple terure”, li aldonis.

„Mi estis, estas kaj estos spektanto de ‘Pluvo’. Ĉi tiu kanalo nenie malaperis kaj daŭrigas sian laboron, nur la licenco por televidsendo estas nuligita de ĝi, sed ĝi havas la eblon elsendi siajn programojn en la jutuba socia reto, al kiu ĝin puŝis la rusia registaro unuflanke kaj Latvio aliflanke”, parolis Vitalij Manskij, rusia dokumentfilmisto, ekde la okupado de Krimeo fare de Rusio en 2014 loĝanta en Latvio. Li opinias, ke la latvaj aŭtoritatoj faris eraron, retirante la licencon de „Pluvo”, kvankam formale tiaj kialoj ekzistis.

„La montrata mapo de Eŭropo, kie Krimeo estas parto de Rusio, estas nur teknika eraro. Kaj la komento de Korosteljov pri la bezono helpi la rusiajn soldatojn batalantajn en Ukrainio kategorie ne rilatas al la pozicio de la kanalo, ĉar ‘Pluvo’ pruvas al siaj spektantoj ĉiutage per fortaj argumentoj, ke la milito en Ukrainio estas krimo de Rusia Federacio, kaj homoj, kiuj iras al Ukrainio por batali, estas krimuloj. Eble tiu prezent-

isto estis laca, eble li malsatis, eble li sentis sin malbone, kaj pro tio li konfuziĝis inter siaj vortoj. La televido forigis tiun komenton en sia platformo eĉ antaŭ prezento de riproĉoj. Krome, la ĵurnalisto estas maldungita, malgraŭ tio, ke li laboris en televido naŭ jarojn kaj estis plurfoje arestita fare de la rusiaj aŭtoritatoj”, aldonis la dokumentfilmisto.

Ankaŭ Rasa Juknevičienė, konservativa membro de la Eŭropa Parlamento (EP) ekdubis pri la decido de la latvaj aŭtoritatoj: „Mi ne certas, ke la solvo estas bona. Jes, eraroj estas faritaj. Ĉu konscie, mi ne entreprenas decidi. Tamen ili devas atingi ne la latvan aŭ litovan publikon, sed la rusan. Kaj ne ĉiujn rusojn, ne tiujn, kiuj kondamnas la militon, sed tiujn, kiuj estas tie. Jes, multaj ne komprenos mian vidpunkton, sed mi provas pensi pri la estonteco, kiam Ukrainio venkos. Pri tiu Rusio, kiun devos krei la homoj de ‘Pluvo’, la homoj, kiuj ĝin rigardas kaj aŭskultas. Kia estos ilia rilato kun ni?” ■



**Laimius**

**STRAŽNICKAS**, akronime „last”, estas litova ĵurnalisto jam dum 35 jaroj. Li esperantistiĝis en 1974 kaj estas kunlaboranto de MONATO ekde 1991.

## VENEZUELO

## De revo al realo



Jezer **DORANTE**  
korespondanto de MONATO en Venezuelo

*La landlimo  
inter Kolombio kaj  
Venezuelo estas unu el  
la plej gravaj en tuta  
Latin-Ameriko.*



BGROCKER / SHUTTERSTOCK.COM

**L**a landlimo inter Kolombio kaj Venezuelo estas unu el la plej gravaj en tuta Latin-Ameriko pro la komerca aktivado de la du landoj. Tiu ĉi linio pli ol 2200 kilometrojn longa samtempe dividas kaj kunigas: Okazas ne nur varaj interŝanĝoj, sed ankaŭ kulturaj kaj popolaj pro la diversfonaj familioj loĝantaj ambaŭflanke de la landlimo.

Pro gerilo ekde 1964 miloj da kolombianoj moviĝis en la najbaran teritorion serĉante pli bonajn vivkondiĉojn kaj fuĝante de la milito. Tiel en landlimaj urboj kreskis la nombro de miksitaj paroj. Laŭ la venezuela Nacia Instituto pri Statistiko 721 791 kolombianoj loĝis en Venezuelo en la jaro 2011. Bedaŭrinde mankas ĝisdataj oficialaj informoj.

Ekde la elekto de Hugo Chávez al prezidenteco de Venezuelo en 1999 ĝis lia morto en 2012 okazis konfliktoj kun la prezidentoj kolombiaj Álvaro Uribe kaj

Juan Manuel Santos, ambaŭ dekstremaj. Feliĉe ĉiu konflikto estis solvita per diplomaciaj rimedoj. Post la morto de Chávez estis elektita kiel prezidanto Nicolás Maduro, sed la tensioj kun la najbara registaro daŭris.

### Sep jaroj de fermiĝo

En 2015 kolombiaj murdistoj vundis venezuelajn militistojn en la landlima urbo San Antonio del Táchira. Tio kolerigis la venezuelan registaron, kiu decidis fermi la landlimojn kun Kolombio dum kelkaj horoj por kapti tiujn krimulojn. Poste, la pozicio iĝis pli kaj pli severa ĝis la 19an de aŭgusto de la sama jaro la venezuela registaro deklaris limofermon dum nedifinita tempo. Kompreneble tiu decido malhelpis ambaŭ landojn ankaŭ ekonomie.

En 2022 la ĵus elektita prezidanto de Kolombio Gustavo Petro, maldekstr-ema politikisto, iniciatis novajn kontaktojn kun la venezuela registaro cele al

plibonigo kaj restarigo de la reciprokaj internaciaj rilatoj.

Kolombio kaj Venezuelo antaŭe havis bonajn ekonomiajn kaj komercajn rilatojn – ĉi-jare la duflanka komerco povus atingi 800 milionojn da usonaj dolaroj. Tial estas necese por ambaŭ landoj remalfermi tiun landlimon.

Post la interkonsenta fazo ambaŭ flankoj aranĝis ĉion, por ke la 26an de septembro 2022 okazu la malfermo. Tiam la unua kolombia ŝarĝveturilo transpasis la ponton al Venezuelo, dum la unua venezuela kamiono faris la samon en la mala direkto. Tio estis granda festo kun rozoj kaj blankaj ĉemizoj, sekvataj de kamionoj ornamitaj per balonoj kaj trikoloraj flagoj.

### Problemoj

Víctor Méndez, plena direktoro de la Kolombia-Venezuela Ĉambro, deklaris, ke „la politiko devas iri al la fono, nia in-

tereso ĉi tie estas komerca”. Sed kio okazis post tio? Ĉu pliboniĝis la ekonomiaj rilatoj poste? Bedaŭrinde ne. Por venezuelanoj kaj kolombianoj la remalfermo estis grava 7-jara revo, sed ĝis nun ĉio iras samkiel antaŭe: koruptado restas ĉiutaga afero ĉe la venezuela landlimo. Tie oni vidas policistojn el ambaŭ landoj ricevantaj monon; aliaj permesas la transiron de tiuj, kiuj montras la pagan kvitancon de la varo.

En ambaŭ landoj ankoraŭ ne estis adoptitaj teknikaj kaj burokraciaj rimedoj, por ke la komerca interŝanĝo okazu plej bone. Multaj el la ŝarĝveturiloj, kiuj transiris en Kolombion, atendis tagojn en la doganejo pro la foresto de impostaj mekanismoj, dungitaro kaj juraj garantioj, kiuj plirapidigus ilian eniron. Tial oni povas diri, ke tia landlima malfermo ankoraŭ ne plene sukcesas por la venezuela kaj la kolombia popoloj. ■

#LULA2022

# Fanatikula voĉdonado

Marcionilo VASCONCELOS  
Brazilo

Ankaŭ en la ĉi-jara baloto evidentis la rolo de futbalo.



MATTIA FOSSATI / SHUTTERSTOCK.COM

En Brazilo okazis la plej konkura baloto en ĝia historio: inter la kandidatoj estis malpli ol du procentoj. Dum la elekto-procezo pluraj elementoj intermiksiĝis kaj boligis la temperamenton de la brazilanoj. En unu flanko estis prezidanto Jair Bolsonaro, kiu batalis por daŭre konservi la potencon kaj eviti la riskon esti malliberigita pro la krimoj praktikataj, dum li estis prezidanto, kaj en la alia flanko estis Lula, eks-malliberigito, kiu asertis sian honestecon kaj vidis la reakiron de la potenco kiel manieron por glorie triumfi post la - laŭ li - maljusta enkarcerigo.

## Futbalo kaj politiko

Laŭ kliŝo, brazilanoj estas ardaĵoj amantoj de futbalo. Eĉ se fojfoje malvera, tio enhavas iom da pravo. Historie, futbalo havis kaj havas grandan rolon en la lando. Ekzemple dum la ludoj por la monda pokalo en 2014, kiam okazis la plej impresa malvenko de la brazila nacia teamo, ankaŭ pli intensiĝis la ĝenerala malaprobo al la registaro de la tiama prezidanto, Dilma Rousseff, kiu estis elpostenigita en 2016. Simile, en 1970, kiam Brazilo konkeris sian trian mond-pokalan stelon, la militista reĝimo, kiu regis la landon, havis sian plej bonan periodon, kaj malgraŭ la intensaj

persekutoj okazigitaj kontraŭ la popolo, post la venko de Brazilo en Meksiko tiu reĝimo havis fazon nomatan „miela luno”.

Ankaŭ en la ĉi-jara baloto evidentis la rolo de futbalo. Ludantoj kiel Neymar kaj Romario – nuntempa kaj eksa ĉampionoj el la brazila nacia teamo, propagandis favore al Bolsonaro. Casagrande kaj Raí – eksaj ludantoj de la brazila nacia teamo – fervore argumentis favore al Lula. En tiu ludo de apogoj, la popolo agitiĝis aplaŭdante tiun aŭ kritikante tiun alian. Kiel en iu tradicia matĉo, la popolo surmetis la ĉemizon de sia teamo: Apogantoj de Bolsonaro alproprigis la oficia-



Dum tiu periodo, Bolsonaro strebis renversi la malfavorajn rezultojn de la opinio-sondadoj kaj ekscitis la pasion de siaj apogantoj

lan T-ĉemizon de la brazila teamo, dum la apogantoj de Lula vestis sin per ruĝa koloro. En la stratoj oni facile identigis la „oponantojn”.

En futbalo ne ekzistas ia rezona motivo praviganta, kial unu homo decidas apogi tiun aŭ alian teamon. Foje tio estas pro familia tradicio, foje pro neklara decido, tamen neniam rezulte de iu profunda analizo. Tio okazas ankaŭ en politiko.

## Malpaca etoso

Futbalo ne estas sinonimo de malpaco, tamen, kiam ĝi ne estas sane administrata, la sentoj de la amasoj spektantaj la matĉojn povas pasiĝi kaj okazigi bedaŭrindajn situaciojn: rasismo kaj perforto inter fanatikuloj aŭ ludantoj estas nur unu el ili. Kio kontribuis, por ke tia malpaca etoso regu en la lando? Antaŭ ĉio gravas konscii, ke ne ekzistas simplaj respondoj por kompleksaj demandoj. Konsiderinte tion, oni povas aserti, ke Bolsonaro



Parto de la apogantoj de Bolsonaro ne akceptis la rezulton de la voĉdono, decidis bloki ŝoseojn kaj petis „militistan intervenon”, ĉar, laŭ ili, la balotoj ne estis justaj.

estis la ĉefa antaŭeniganto de tia pasia konduto dum la balotoj.

## Ekscitita pasio

Dum tiu periodo, Bolsonaro strebis renversi la malfavorajn rezultojn de la opiniosondadoj kaj ekscitis la pasion de siaj apogantoj, argumentante, ke, se Lula

venkos la baloton, Brazilo estos ekregata de komunistoj, kaj la libereco de la popolo estos perdita. Ankaŭ kiel parton de tiu strategio, Bolsonaro uzis sekretan fi-

nancan fonduson por aĉeti la voĉojn de deputitoj, por ke ili apogu liajn projektojn: tiel kelkajn monatojn antaŭ la balotoj li sukcesis aprobigi stipendion por helpi malriĉajn familiojn. Tio forte influis la popolan opinionon pri lia registaro, tial la takso pri Bolsonaro pliboniĝis kaj helpis lin akiri pliajn voĉojn.

## Neniu spaco por dialogo

Menciindas ankaŭ religia aspekto. Por pasiigi la politikan diskuton, Bolsonaro kriis al la popolo, ke Lula estas favora al abortigo (tabua temo en Brazilo) kaj apogas gejemajn politikojn. Tiel oni sukcesis timigi la homojn kaj mobilizi religiemulojn por batali kontraŭ la Laborista Partio.

En tia scenaro ne ekzistis spaco por dialogo pri temoj gravaj por la brazila socio. Ekonomio, mediprotektado, internaciaj rilatoj ktp estis tute flanke lasitaj pro la „kristanaj temoj”, kiuj tre dividis la opiniojn kaj forte influis la rezulton.

Eĉ post la „fina fajfo” la ludado daŭras en la brazila etoso: parto de la apogantoj de Bolsonaro ne akceptis la rezulton de la voĉdono, decidis bloki ŝoseojn kaj petis „militistan intervenon”, ĉar, laŭ ili, la balotoj ne estis justaj. Tia konduto simile okazas post futbalmatĉoj, kiam, fojfoje, malvenkintoj surstratiĝas kaj agresas la apogantojn de la venkintoj, ĉar ili juĝas la ludadon ne bone regita de la arbitracianto. ■



“Naturista Vivo”, la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero.

La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj.

Internacia Naturista Organizo Esperantista.

Adreso: József Németh, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/S.

Rete: [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com).

## MILITO EN UKRAINIO

## „Ĉesigu tuj la pafadon!”



Tommaso **MELACOTTE**  
korespondanto de MONATO en Italio

En novembro formiĝis la plej granda porpaca manifestacio de multaj jaroj en Italio.



**P**li ol ok monatojn post la komencigo de la milito en Ukrainio, la 5a de novembro 2022 estis memorinda tago por italaj kaj eŭropaj subtenantoj de paco. „Ĉesigu tuj la pafadon!” estis la slogano de la amasa manifestacio, kiu okazis en Romo favore al la postuloj de tuja ĉesigo de la milito en Ukrainio, plena nuklea mal-

armado kaj tujaj internaciaj diplomatiaj intervenoj rilate al la milito.

### La manifestacio

Kun firma kondamno al la invado kaj al tiuj regadsistemoj, kiuj metas armilojn kaj profiton antaŭ ĉion celantan atingi internacian pacon, pli ol 150 000 homoj trairis Romon ĝis la placo Sankta Johano, kie plu-



La 5a de novembro 2022 estis memorinda tago por italaj kaj eŭropaj subtenantoj de paco

raj politikistoj, asocioj kaj laikaj organizaĵoj esprimis sian subtenon al la ukraina popolo. La amaso de viroj, virinoj, studentoj, laboristoj, junuloj kaj aktivuloj el la tuta civila socio estis la plej granda porpaca manifestacio okazinta dum multaj jaroj en Italio.

La homoj venis el diversaj asocioj, pacforumoj, volontulaj institucioj, societoj kaj movadoj, kiuj – sen poli-

La manifestaciantoj  
eniĝis ankaŭ en la  
koncentriĝon organizitan  
de „Eŭropo por Paco”.



## Aliĝo de elstaruloj

„La konkurenca logiko de la ekonomia merkato estas nur antaŭaĵo de tiu antagonismo inter venkintoj kaj venkitoj, inter agresintoj kaj agresitoj, kiun oni nomas milito”, diris la pastro Luigi Ciotti, renoma itala presbitero, aktivulo kaj fondinto de *Asocio Libera*, kiu de la jaro 1995 okupiĝas pri la defendo de rajtoj, socia egaleco kaj justeco kontraŭ organizita krimado kaj subaĉetado.

En la placo Sankta Johano multaj aliaj famuloj aliĝis al la manifestacio, kies rolantoj eniĝis en la koncentriĝon organizitan de la anoj de *Europe for Peace* (Eŭropo por paco), kies deklaro alvokas al interkonsento. Ĝi priraportas ankaŭ la kontraŭdirojn ekzistantajn en ekonomia kaj politika sistemo, kiuj estigas bazojn por militoj en la tuta mondo kaj maljustecon.

## Temoj celitaj

En la diverseca etoso, kiu regas en ĉiuj spacoj de la itala socio, la tuta tago estis plena de esprimoj favoraj al novaj agadlinioj por alfronti la gravajn temojn de nia jarcento – kiel la rilatoj inter malriĉeco, rajtoj kaj milito –, proponi ŝanĝojn en la politikoj pri internacia kunlaborado kaj ankaŭ atingi, ke Ukrainio ne plu estu batalkampoj en la koro de Eŭropo. ■

tikaj preferoj – postulis strebojn por atingi interkonsenton ĉesigi la militon kaj la perdadon de homaj vivoj, kies kvanto tagon post tago pligrandiĝas. Laŭ Eŭropa Unio ĝis novembro 2022 pli ol 100 000 personoj estas mortigitaj kaj vunditaj, kune kun 86 000 rusiaj soldatoj, laŭ la taksadoj de la ukraina ministro pri defendo.

## Itala sinteno

Laŭ deklaroj de *Rete Italiana Pace e Disarmo* (Itala Reto pri Paco kaj Malarmado)<sup>1</sup> tiun ĉi militon „ni devas tuj ĉesigi. Ne plu estu suferoj. Italio, Eŭropa Unio, la membroŝtatoj kaj Unuiĝintaj Nacioj devas surpreni la respondecon de intertraktado”.

1. Itala Reto pri Paco kaj Malarmado naskiĝis la 21an de septembro 2020 el la unuiĝo de du historiaj korpoj de la itala pacisma kaj senarmigaj movadoj Paca Reto (fondita en 2014) kaj Itala Reto pri Malarmado (fondita en 2004).

Tiu movado klare pravas la italan senton pri la milito: 53,2 % de la italoj nuntempe estas kontraŭaj al la daŭrigo de la milito kaj al la sendado de armiloj. Pro tio la manifestacio fariĝis postula platformo, por ke la institucioj konsideru la proponojn rilate al diplomatia solvo kaj al la sufero de la ukraina popolo, kaj kontraŭ la pliiĝo de la militelspezoj en Italio kaj en Eŭropo.

## Ne nur en Romo

Okazis manifestacioj ankaŭ en 100 aliaj italaj urboj. Notinda kvanto da partoprenantoj venis el la Eŭropa Parlamento en Strasburgo, kie 17 italaj parlamentanoj redaktis dokumenton subtene al la temoj de la movado. „Ni estas konvinkitaj, ke estas necesa pli granda ĉefrolado de Eŭropa Unio por atingi solvojn, kaj pro tio ni do venos surstraten kaj el ĉi tiu placo aŭdigos nian voĉon al la eŭropa parlamento”, asertis la deputitoj.

”

Laŭ deklaroj de Eŭropa Unio, ĝis novembro de 2022 pli ol 100 000 ukrainaj soldatoj kaj 20 000 civiluloj estis mortigitaj

”

53,2 % de la italoj nuntempe estas kontraŭaj al la daŭrigo de la milito kaj al la sendado de armiloj

”

Okazis manifestacioj ankaŭ en 100 aliaj italaj urboj

## MIGRADO

# Transpasi Manikon per boatoj



**Bardhyl SELIMI**  
korespondanto de MONATO en Albanio

Laŭ atatempe notinde pliigi la neleĝa transpaso de Maniko, la marparto inter Francio kaj Anglio, fare de ekonomiaj rifuĝantoj, inter ili ankaŭ albanoj. Helpe de krimaj bandoj en la nordo de Francio kaj eĉ en Britio, miloj da albanaj civitanoj uzas kaŭĉukajn boatojn por atingi Brition. Ĉiu persono devas pagi al la perantoj kaj transportantoj almenaŭ 5000 pundojn (ĉ. 5800 eŭrojn).

En la jaro 2020 nur 50 albanoj atingis per tiaj veturiloj la britan marbordon, sed la nombro estis 800 en 2021 kaj 12 000 en la jaro 2022.

## Brita maltrankvilo

La brita registaro estas ege maltrankvila. Ĝi interkonsentis kun la regist-

aro de Albanio, ke oficistoj de la ministrejo pri internaj aferoj de la malgranda balkana lando deĵoros en Dover por kunordigi la laboron kun britaj aŭtoritatoj rilate al tiu nova fluo de enmigrintoj.

## Kial eniri Brition?

Tridek jarojn post la falo de la diktaturo de Enver Hoxha kaj la malfermiĝo de Albanio, ĉirkaŭ 60 elcentoj de la plenkreskinta loĝantaro esprimis sian volon forlasi la patrujon, laŭ enketo farita de Gallup<sup>1</sup> en decembro 2018. La kialoj estas interalie koruptado,

1. Workplace Consulting & Global Research. Tutmonda analiza kaj konsila firmao, kiu helpas gvidantojn kaj organizaĵojn solvi siajn plej urĝajn problemojn.  
<https://www.gallup.com/>



@SAMZYRAJALB

La veraj krimuloj albanaj ne reprezentas la tutan albanan komunumon tie. Tion montris ankaŭ la lastaj amasaj protestoj en Londono, kiujn faris albanoj loĝantaj en Britio.

malaltaj salajroj, malbonaj laborkondiĉoj kaj malalta vivkvalito.

La averaĝa jara enspezo de albana familio estis 1997 eŭroj en 2018, dum en Britio 21 464 eŭroj. La indico pri senlaboreco ĉe gejunuloj (inter 15- kaj 29-jaraj) estas 20 %.

Ĝenerale la ekonomiaj rifuĝantoj devenas de la nord-orienta parto de Albanio, kiu tradicie estas forgesata de ĉiuj sinsekvaj registaroj, kvankam tie la lando ĉerpas valoregajn ercojn kaj elektran energion danke al hidroelektraj centraloj.

## Krimaj rifuĝantoj?

Multaj britaj registaraj proparolantoj kaj gazetoj

erare konsideras tiujn povrajn rifuĝantojn krimuloj kaj deklaras, ke ili intensigis la krimadon tie. Tio ne veras. Laŭ oficialaj dokumentoj de la 1a de januaro 1995 ĝis la 30a de junio 2016 akiris la britan civitanecan 11 360 albanaj civitanoj, sed triobla nombro reprezentas ĉiujn albanajn civitanojn jam loĝantajn en Britio.

Ili estas laboremaj, honestaj, junaj, inventemaj kaj sanaj, kio ankaŭ helpas la britan ekonomion. La veraj krimuloj albanaj ne reprezentas la tutan albanan komunumon tie. Tion montris ankaŭ la lastaj amasaj protestoj en Londono, kiujn faris albanoj loĝantaj en Britio. ■

## EKOLOGIO

# Armenaj skribiloj kun semoj



Lida **ELBAKJAN**

korespondanto de MONATO en Armenio



La civilizita mondo vole-nevole faras multon, kio kaŭzas malprofiton al nia naturo. Tamen estas homoj, kiuj pripensas, kiamaniere malgrandigi tiun malfavoran influon de la homaro.

**E**n Armenio komencis kreiĝi ekologie puraj skribiloj el recikligitaj paperoj kun semoj de diversaj legomoj. La semoj troviĝas en malfermitaj kapsuloj algluitaj al la bazo de la skribilo. Dum la uzado necesas ne meti la skribilon sub la sunradiojn.

## Avantaĝo

Kiam tia skribilo ne plu havas inkon, eblas ĝin enterigi. Tion oni faru laŭ 30-grada angulo, por ke la ĝermo kresku vertikale. Du aŭ tri tagojn poste semoj ekĝermas, kaj tiel la skribilo fariĝas perfekta sterko.

El tiuj semoj povas kreski karoto, rafaneto, fenkolo, bazilio, petroselo. La fabrikantoj uzas pli ol 30 specojn de semoj, kiuj bone ĝermas en nia klimato. Tamen ili jam provas ankaŭ aliajn ekzotikajn kreskaĵojn.

## Manlaborado eduka

La armenaj ekoskribiloj estas unuopaj varoj. La tuta procezo estas manlabora, kaj ĝi konsistas el 10-12 diversaj agoj.

La skribiloj kaj la inko povas esti diverskoloraj. Sur la skribilon eblas skribi propran nomon, nomon de organizaĵo aŭ simplan vorton, laŭ la volo de la mendinto.

”

En Armenio komencis kreiĝi ekologie puraj skribiloj

”

Kiam tia skribilo ne plu havas inkon, eblas ĝin enterigi

La fondinto de tiu projekto, Artak Elbakjan, notas, ke tiaj ekoskribiloj edukas la infanojn pri la neceso konservi la medion kaj esti respondeca pri ĝia pureco.

La organizantoj planas malfermi subĉielan muzeon kun vivaj kreskaĵoj. ■



**Lida ELBAKJAN**

estas geografiisto, patentologo, instruistino de Esperanto. Eksprezidantino de Armenia Esperanto-Asocio. Nun ŝi estas reprezentanto kaj sekciestro de ILEI en Armenio.





MIGRADO

PRESIDENCIA VENEZUELA

# Venezuelaj infanoj en panama ĝangalo

De januaro ĝis oktobro de 2022 pli ol 32 000 infanoj venezuelaj trairis la danĝeran ĝangalon Darién. Ili kune kun siaj familianoj alfrontas plurajn danĝerajn situaciojn.



**Jezer DORANTE**

korespondanto de MONATO en Venezuelo

Laŭ la Infana Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj (UNICEF), de januaro ĝis oktobro de 2022 pli ol 32 000 infanoj venezuelaj trairis la danĝeran ĝangalon Darién. Tio reprezentas kreskon de 10 % kompare kun la sama periodo de 2021. En tiu vojaĝo ili kune kun siaj familianoj alfrontas plurajn danĝerajn situaciojn: perforton, seksperfor-

ton, homŝakradon kaj ekspluatadon, mankon de akvo kaj manĝaĵo, atakojn de insektoj kaj sovaĝaj bestoj kaj torentajn riverojn.

Kvindek elcentoj de la infanoj havas malpli ol kvin jarojn, kaj tie ilin povas kapti lakso, akvomanko kaj aliaj malsanoj. Krom tio, multaj knaboj kaj knabinoj suferas streĉon kaj emocian damaĝon ligitajn kun tiu danĝera vojaĝo.

## Malbonaj statistikoj

Kvankam laŭ oficialaj fontoj du aŭ tri infanoj mortis en 2022, ne-oficialaj fontoj jam parolas pri pli ol cent infanoj. Pri tio atestas homoj, kiuj dum la vojaĝo vidis korpajn de tutaj familioj

mortintaj eĉ kun siaj infanoj. Sed la mortintoj ne aperas en la oficialaj raportoj.

Pli freŝaj datumoj de *Missing Migrants Project*<sup>1</sup> (Projekto pri Malaperintaj Migrantoj) indikas 32 mortojn kaj malaperojn en 2022 nur en Darién, el kiuj

1. La Projekto pri Malaperintaj Migrantoj de la Internacia Organizaĵo pri Migrado (IOM) registras okazojn, en kiuj migrantoj, inkluzive de rifuĝintoj kaj azilpetantoj, mortis ĉe ŝtatlimoj aŭ dum la migrado al ali-landa celloko.

10 koncernas verŝajne neplenaĝulojn, sed la naciecoj ne estas precizigitaj. Fakte, la plimulto de la korpoj restas neidentigitaj, kio estas problemo rilata al ĉiuj viktimoj sendepende de aĝo aŭ origino.

La raporto atentigas, ke la bazaj mankoj survoje, kiel trinkakvo kaj kuracista prizorgo, kondukas al situacio de ekstrema vundebleco ĉe beboj. Aldone „la malbonaj kondiĉoj de la vojo metas infanojn en apartan riskon pri lakso, spirmalsanoj kaj akvomanko”.

### Gravuloj esprimas sin

En Lajas Blancas, en la panama regiono Emberá, funkcias akceptejo por migrantoj, kie Hannan Sulieman, asista ĝenerala sekretario kaj administra vicdirektoro de UNICEF, diris: „Perforto, malriĉeco kaj la espero trovi pli bonajn vivkondiĉojn eksterlande puŝas familiojn kun infanoj forlasi siajn hejmojn kaj alfronti danĝerojn en sovaĝaj lokoj, kiel la ĝangalo Darién.”

Ankaŭ la plenuma direktoro de la organizaĵo avertis: „En Panamo, kiel en multaj aliaj landoj, la rapida kresko de la kvanto de migrantaj infanoj troŝarĝas la kapablon de la ŝtato provizi bazajn servojn por respondi al iliaj bezonoj. UNICEF alvokas ĉiujn registarojn agi por protekti migrantajn infanojn sendepende de ilia origino. Knaboj kaj knabinoj neniam plu spertu situ-

”

En Lajas Blancas panamaj institucioj kunlaboras kun UNICEF por helpi la migrantojn

”

Multaj knaboj kaj knabinoj suferas streĉon kaj emocian damaĝon ligitajn kun tiu danĝera vojaĝo

”

La mortintoj ne aperas en la oficialaj raporto

”

Hannan Sulieman: Perforto, malriĉeco kaj la espero trovi pli bonajn vivkondiĉojn eksterlande puŝas familiojn kun infanoj forlasi siajn hejmojn

aciojn, en kiuj ilia sekureco kaj bonfarto estas en danĝero.”

### Zorgoj ĉe la katolika medio


La migrada afero zorgigas eĉ monsinjorojn Jesús González de Zárate kaj Mario Moronta – respektive prezidanton kaj vicprezidanton de Venezuela Episkopa Konferenco (ĉefa katolika organizaĵo en Venezuelo) – kiuj estis gastoj de la episkopo de Apartadó, Hugo Torres Marín. Ili pritraktis la gravan kaj emocian situacion rilate al la kvanto de migrantoj en tiu loko kaj al la kvanto de knaboj kaj knabinoj, kiuj komencas tian danĝeran vojaĝon.

En la municipo Necoclí, kien miloj da migrantoj venas antaŭ ol iri al la limo kun Panamo, okazas kutimaj renkontiĝoj kun diversaj aŭtoritatoj. Tio okazas kadre de la kunlaborado inter la episkopoj de ambaŭ landoj por disdoni necesajojn al la trairantaj homoj: akvon, manĝaĵon kaj kuracilojn. ■



#### Jezer DORANTE

estas instruisto pri hispana lingvo kaj literaturo, radioparolisto kaj muzikisto. Li kreas esperantan enhavon por Jutubo kaj verkas dulingvajn artikolojn.



Artikolojn pri la vivo en via regiono sendu al [moderna\\_vivo@monato.be](mailto:moderna_vivo@monato.be).



TORO RINALDI / SHUTTERSTOCK.COM

*En Ĝakarto, la ĉefurbo de Indonezio, oni taksas, ke la tero malaltiĝas je ĉirkaŭ 3 milimetroj jare. Indonezia registaro decidis transloki la ĉefurbon.*

**ESTONTECO**

# Klimatŝanĝo, marbordaj inundoj kaj eventualaj solvoj

Ali Aulia **GHOZALI**  
Indonezio

**M**arbordaj inundoj, nome inundoj kaŭz-itaj de marakvo kaj tajdoj, certe eniras la temaron, kiam oni diskutas pri la klimatsanĝo. La tradicia solvo estas konstrui digojn, tamen ĉu tio solvos la problemojn? Se diri simple, ne!

La ŝlosila faktoro, kiu difinas la inundoriskon en iu difinita loko, estas la relativa alteco de la loko kompare al la averaĝa marnivelo. Ju malpli la alteco, des pli la inundodamaĝo. Normale eblas konservi altecon, se oni konservas la ekvilibron de la profunda kaj malprofunda subtera akvo. Tamen, ju pli multe oni eltiras tiun

akvon, des pli rapide sinkas la tero. Tio kaŭzas grandan problemon por marbordaj urboj, kiuj eltiras tro multe da subtera akvo. En Ĝakarto, la ĉefurbo de Indonezio, oni taksas, ke la tero malaltiĝas je ĉirkaŭ 3 milimetroj jare. Tiu nombro ŝajnas malgranda, sed la akumula rezulto estontece kreas gravan problemon, precipe

oftajn inundojn de la marbordo. Multaj studoj jam prognozas, ke Ĝakarto povos enprofundiĝi en 2050.

## Manko de sensala akvo

Kiam dolĉa akvo subtera estas eltirata kaj la marborda tero sinkas, la sala marakvo penetras pli en

la teron. Tio kreas novan problemon: dolĉa akvo pli kaj pli malhaveblas. Pro tiu problemo, homoj vivantaj ĉe la marbordo devas aĉeti multekostan dolĉan akvon por trinki. Samtempe, kiam la tero sinkas, oni eventuale serĉas freŝajn fontojn aŭ prenas akvon de pli profunde, kio altigas la konsumon de la grundakvo kaj plirapidigas la tersinkadon. Tial la lokaj registaroj jam klopodas limigi konsumadon de grundakvo.

La sekvoj de tiu tersinkado povas esti teruraj por marbordaj komunumoj. Multaj homoj devas translokiĝi, kio kaŭzas sociajn problemojn rilate loĝlokojn kaj loĝejojn, kaj samtempe ŝanĝas la manieron, laŭ kiu oni uzas la pli altan terenon, kaj tio povas havi malfavoran efikon sur la agrikulturo. La provizora solvo estas konstrui pli altajn digojn por ŝirmi urbojn, kiel oni klopodis fari en Ĝakarto kaj Semarang. Tamen en majo 2022 la digoj de Semarang rompiĝis, kaj la maro inundis la urbon. Tio okazis dum la sezono de altaj tajdoj, kaj la inundo atingis 1,5 metrojn.

Oni taksas, ke la tutmonda marnivelo plialtiĝis mezume je 1,4 milimetroj jare dum la 20a jarcento. La usona *National Oceanic and Atmospheric Administration* (NOAA, Nacia Oceana kaj Atmosfera Administracio) prognozas, ke la marnivelo estos ĉirkaŭ 40-60 centimetrojn pli alta fine de la

nuna jarcento. Ju pli la marnivelo plialtiĝos, des pli granda la minaco de tiaj inundoj kune kun la gravaj ekonomiaj, sociaj kaj politikaj problemoj, kiujn ili kaŭzas.

## Ĉu transloki urbojn?

La klimatsanĝo estas unu el la kialoj, pro kiuj la indonezia registaro eĉ decidis transloki la ĉefurbon el Ĝakarto al IKN (Ibu Kota Negara Nusantara; La Ĉefurbo de Nusantara) en Orienta Kalimantano. Tamen, tiaj solvoj ne ĉiam eblas. Kien transloki la ĉefurbon de Maldivoj kaj tiujn de etaj landoj en Pacifiko? Marbordaj inundoj tuŝas la vivojn de milionoj da homoj, en Barato, Bangladeŝo, Ĉinio kaj aliloke. Ebligi la translokiĝon de tiuj milionoj estus malfacila, eĉ konfliktoveka, afero.

Necesas tutmonde trovi politikajn, ekonomiajn kaj sociajn solvojn por rebonigi la klimaton. Tiuj solvoj samtempe estu humanaj, por kontraŭbatali la kreskantan, multflankan malegalecon. Ĉu jam estas tro malfrue? Mi esperas, ke la homaro trovos la volon resanigisian solan domon, la teron. Ni ankoraŭ ne elmigru al aliaj planedoj, kiel Marso, ĉu? ■

**JURO**

# Malliberejo pro ekocido

pp Belgio

End Ecocide Belgium, juna civitana movado maltrankvila pri la ekologia krizo, diras, ke krimigi ekocidon povus fundamente ŝanĝi la manieron kiel ni traktas nian vivmedion.



©MARIAGERNERT

**E**kocido, konscia grandskala damaĝo al la medio, estas unu el la krimoj registritaj en la nova krimkodekso, pri kiu la federacia registaro de Belgio atingis interkonsenton fine de 2022. La antaŭa krimkodekso datumas de la 19a jarcento. En la estonte-co ĉiu, kiu kaŭzas gravan damaĝon al la medio, alfrontos malliberecajn punojn de 10 ĝis 20 jaroj.

„Ekocido estas krimigita laŭ la franca ekzemplo, ĉar ni kredas, ke oni devas agadi kontraŭ longdaŭra kaj grandskala damaĝo al la medio kaj la planedo”, diris

la belga ministro pri justico Vincent van Quickenborne.

Joeri Thijs de la ekologia organizaĵo *Greenpeace* parolas pri grava paŝo farita. „Nun estos multe pli facile defendi la rajtojn de la naturo en, ekzemple, procesoj”, diras Thijs.

*End Ecocide Belgium*, juna civitana movado maltrankvila pri la ekologia krizo, diras, ke krimigi ekocidon povus fundamente ŝanĝi la manieron kiel ni traktas nian vivmedion. Ekocido estis ĝis nun farata kun la permeso de la leĝo. Sed se ĝi estas parto de la krima juro, la respondeculoj sentos fortan malinstigon. ■

## ENERGIO

# Novaj sunpaneloj sen PFAS



Bert de Wit  
Nederlando



SOLARGE

La fotovoltaan ĉelon inventis Charles Fritts jam en 1883. Tamen nur ekde la naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento multobligis sunpaneloj kun tiaj ĉeloj. La plej grava produktanto estas nun Ĉinio. La sunpaneloj, kiujn oni produktis ĝis nun, estas kunmetaĵoj de vitro, silicio, kupro kaj aluminio. Kaj ĉirkaŭ la panelo troviĝas polimera substanco, kiu bedaŭrinde enhavas iom da perfluoralkilaj kaj polifluoralkilaj substancoj (PFAS), pri kiuj oni suspektas, ke ili damaĝas la sanon, se liberigitaj en la medion.

Malavantaĝo de la unua generacio de sunpaneloj estas, ke ili malfacile povas esti disigitaj en siajn originajn substancojn. Kaj alia malavantaĝo estas, ke la pezo de sunpanelo povas esti tro granda por iuj tegmentoj, tiel ke oni ne povas profiti de la eblo generi tie energion el sunlumo.

## Bioplasto

Oni prognozas ĝis la jaro 2040 kreskon de la uzo de la menciitaj sintezaj

polimeraj substancoj ĝis la 3,5-oblo de la nuna produktado. Tio povos kaŭzi problemojn. Kruda petrolo ne estas ĉie kaj ĉiam malmultekosta. Tial oni pensas, ke en 2040 40 % de la plasto estas bioplastoj. Bioplastoj estas formo de stokado de karbondioksido kaj ne kuntrenas la produktadon de PFAS-substancoj dum industriaj procezoj. Tiuj substancoj estas ĉiam pli kontestataj. Se oni produktas nun sunpanelon, dum la produktado formiĝas ankaŭ karbondioksido, 1425 kg CO<sub>2</sub>/kW<sub>p</sub><sup>1</sup>.

Kaj kion oni faru pri la sunpaneloj ne plu uzataj? En aliaj sektoroj oni strebas al reuzado de produktoj „de la lulilo ĝis la tombo”. Sed tio ne eblas nun.

Tiuj pensoj igis kelkajn nederlandajn teknikistojn kaj medio-fakulojn pensi pri alternativa sunpanelo.

1. kW<sub>p</sub>: „kilovato-pinto”, mezurunuo por la povo per kiu fotovoltaa ĉelo povas transformi sunenergien en elektro sub normitaj (t.e. idealaj) kondiĉoj. Unu vato-pinto egalas al la produktado de elektra povo de unu vato sub tiuj kondiĉoj.

Ĝi estu facile disigebla en siajn partojn, kaj la polimeroj estu facile reuzeblaj. La pezo de la sunpanelo estu reduktita, kaj la prezo estu ne multe pli alta ol la nuna. Kaj la CO<sub>2</sub>-eligo dum la produktado estu malpli granda.

Tiel, la inĝenieroj de la kompanio *Solarge* projektis novan specon de sunpanelo. La sunpaneloj de *Solarge* eligas 100 kg da CO<sub>2</sub>/kW<sub>p</sub>. La pezo de la panelo estas reduktita al 11 kg anstataŭ la 23 kg de vitra sunpanelo. Kaj, se oni uzas bioplastojn, oni evitas 4 kg da CO<sub>2</sub> por ĉiu kilogramo da plasto. Se oni uzas reuzitan plaston (kiun oni antaŭe kolektis), oni evitas 2 kg da CO<sub>2</sub> por ĉiu kilogramo da plasto. Por la nova sunpanelo la eligo estas 100 kg/kW<sub>p</sub> (anstataŭ la 1425 kg de ĝis nun konataj sunpaneloj).

En la sudo de Nederlando kaj en la nordo de Belgio, diversaj fabrikoj kaj laboratorioj estas engaĝitaj en la produktado de la novtipaj sunpaneloj. Fabriko en Weert ekproduktos komence de 2023. Oni inten-

cas produkti 380 MWp da sunpaneloj. Ankaŭ la formo de la paneloj povas ŝanĝiĝi. Ne nur kvadrataj, sed ankaŭ en aliaj formoj, kiuj ekzemple povos rezisti fortajn ventojn. Oni povas adapti la formon al la deziroj de la kliento.

## Subvencioj

Se la fabriko produktos 1-1,5 milionojn da sunpaneloj jare, ĝi certe povos konkurenci kun alilandaj produktantoj. Por la disvolvado de la projekto la inĝenieroj ricevis subvenciojn de la nederlanda registaro kaj de la Eŭropa Komisiono. Cetere oni planas ankaŭ kombini du tavolojn da fotovoltaaj ĉeloj en diversaj kombinaĵoj, tiel ke la rendimento de la sunĉelo (ĝis nun ĝis 25 %) fariĝos 40 %.

Kvankam la fabriko unu-aloke produktas por grandaj liverantoj de sunpaneloj, jam nun venas multaj petoj de privatuloj, kiuj volas aĉeti tiujn novtipajn sunpanelojn. Oni jam dungis specialan kunlaboranton, kiu okupiĝos pri la informpetoj de privatuloj. ■

## NUTRADO

# Ju pli da vitaminoj, des pli bone. Ĉu?

Cristina **CASELLA**

korespondanto de MONATO en Italio



MAXX-STUDIO / SHUTTERSTOCK.COM

Vitaminoj ĝenerale ĝuas la famon esti substancoj, kiuj „povas nur bonfartigi”, tiel ke la konsumado de multvitaminaj suplementoj – facile haveblaj eĉ en superbazaro aŭ per Interreto – ĉiam pli disvastiĝis, precipe en la lastaj jaroj.

## Avitaminozo

Efektive vitaminoj estas kunmetaĵoj esencaj por la ĝusta funkciado de homa organismo, ĉar ĝi ne kapablas produkti ilin aŭtonome. Ĉi tial, se ni ne enkondukas ilin pere de nutrado je la ĝustaj kaj oportunaj kvantoj, ni povas sperti vitamino-mankon, ankaŭ nomatan avitaminozo.

## Hipervitaminozo

Ne ĉiuj tamen scias, ke ekscesa enkondukado de vitaminoj, precipe de A, D, E aŭ K liposolveblaj, povas estis kialo de la precize kontraŭa malsano, kies nomo estas hipervitaminozo kaj kiu kelkfoje povas eĉ havi multajn severajn konsekvencojn. La simptomoj de hipervitaminozo estas diversaj kaj ŝanĝigemaj, sed



Vitaminaj suplementoj ne devas esti alprenataj dum longa periodo aŭ sen certigita neceso

eventuala timo esti trafita de tiu sanproblemo tute ne puŝu la legantaron al limigo de fruktoj kaj legomoj! Fakte enkonduki danĝerajn dozojn de ĉi tiuj vitaminoj per naturaj nutraĵoj estas ege malfacile, se ne tute neeble. Sed la aferoj ja malsamas, se temas pri la alpreno de piloloj, kiuj entenas treege altan kvanton da tiuj (en normala kvanto altvaloraj kaj sekuraj) vitaminoj. Tion regule substrekas pluraj fakuloj,

kiel ekzemple Alessandro Nobili kaj Luca Pasina, de la itala departemento pri politikoj por la homa sano, samkiel aliaj sciencistoj de la instituto pri medikamentaj esploroj Mario Negri en Milano.

## Konsultu ĉiam kuraciston

Estas do bone memori ĉiam, ke vitaminaj suplementoj ne devas – kvazaŭ bombonoj – esti alprenataj dum longa periodo aŭ sen certigita neceso. Pro tio, estas rekomendinde regule konsulti sian kuraciston pri ĉiuj suplementoj, kiujn oni deziras preni aŭ, eĉ pli grave, prenigi al neplenkreskaj gefiloj. Plej ofte temas pri nur supozataj bezonoj: por plenumi ilin ja estas vasta elekto de freŝaj, allogaj – kaj ja pli bongustaj – manĝaĵoj. ■

KUBO

# Ĉu zebrofiŝoj kuracos neŭrologiajn malsanojn?



Juan Carlos **MONTERO MEDINA**  
korespondanto de MONATO en Kubo



GRIGOREV MIKHAIL / SHUTTERSTOCK.COM

La unua laboratorio pri zebrofiŝoj, celanta biomedicinan esploron de neŭrologiaj malsanoj, inaŭguriĝis en Kubo en septembro 2022, ĉe la Centro pri Esplorado kaj Medikamentdisvolviĝo (CIDEM), parto de la entrepreno *BioCubaFarma*. Alejandro Saúl Padrón Yaquis, direktoro de la centro, certigis, ke estis urĝa bezono krei tiun institucion.

**M**al multe konata fakto estas, ke zebrofiŝoj kunhavas 70 elcentojn de siaj genoj kun homoj. Ĉi tiu elcentaĵo, cetero, en patologiaj kondiĉoj, povas atingi eĉ 85 elcentojn. Tial la scienca komunumo altiriĝis al tiu aparta speco, kun la espero povi scii pli pri gravaj neŭrologiaj malsanoj kaj sekve trovi taŭgan kuracadon. Zebrofiŝoj estas uzataj por simuli ne nur la parkinsonan kaj alcheymeran malsanojn, sed ankaŭ interalie platsklerozon, epilepsion, anksion kaj deprimon.

## Kobajoj

Laboratoriaj bestoj, nomataj ankaŭ provbestoj aŭ kobajoj, estas vertebruloj aŭ senvertebruloj, utiligataj

dum medicina testado kaj por diversaj sciencaj celoj. Ili taŭgas ĉefe por esplori, kiamaniere oni efike luktu kontraŭ homaj kaj bestaj malsanoj. La kobajoj plej ofte uzataj ĉe laboratoria eksperimentado estas kunikloj, musoj kaj ĝenerale ratoj, sed, krom ĉi tiuj, oni ne hezitas uzi eĉ simiojn, bovojn, ŝafojn, kaprojn, hundojn, katojn, hamstrojn ktp.

## Model-organismoj

Tiel nomataj model-organismoj estas specioj utilaj al sciencistoj por esplori iliajn specifajn biologiajn procezojn, kiuj povas doni ideon pri la funkciado de tiaj procezoj en aliaj vivantaj organismoj. Iliaj genetikaj trajtoj tre similas al la homaj kaj kutime estas uzataj en diversaj esplora-

fakoj. Ili estas tre taŭgaj precipe por genetika kaj alitipa esplorado en la fako de biologio.

Jen ekzemploj de model-organismoj: muso (science *mus musculus*), rato (*rattus norvegicus*), bananmuŝo (*drosophila melanogaster*) kaj ja zebrofiŝo (*danio rerio Hamilton*). Zebrofiŝoj estas ciprinedoj proksimaj al karpoj kaj barbioj, devenantaj de sud-orienta Azio: ili ĉefe vivas en lagoj, riveroj kaj lagoj en Barato.

La fekundiĝo de zebrofiŝoj okazas je kontrolataj kondiĉoj kaj estas zorge kaj detale observata de fakuloj. Tio garantias, ke per la travideblaj embrioj oni sekvas kaj analizas la tutan procezon pri la estiĝo de organoj en fiŝoj, kio estas premiso por pli profunda studado de biologio. ■

ESEO

# La mistera tria viro



**Garbhan MacAoidh**

korespondanto de MONATO en Irlando

La aŭtoro esperas, ke la legantoj permesu, ke per persona sperto li komencu ĉi tiun eseon. Antaŭnelonge okazadis al li iom stranga fenomeno. Dum piedpromeno sur la strato, kaj nemalofte eĉ hejme, la artikolanto rimarkadis, ke alia viro (aŭ pluraj personoj) akompanas lin. Iĝis ĉiufoje evidente, ke li estas sola: alia homo, aŭ homoj, ja neniam estis apud li. Temis sekve pri probabla halucino. Notindas, ke li ne estis ebria. Tamen, dum iom da tempo, efektive zorgigis lin kelkaj familiaj problemoj, kio teorie povus havi kelkan rilaton al la afero.

La koncernata sperto tiom impresis la verkanton, ke li tuj konsultis sian propran kuraciston, kiu sendis lin al loka hospitalo, kie li devis pasiĝi kvar tagojn por plenumi tutan serion da testoj kaj skanoj. La medicinistoj supozis, ke eble lin trafis eta ikto/iskemio/apopleksio ... La paciento tamen ne kredis tion, ĉar, post eliro el la hospitalo, li sentis sin denove tute normala kaj ne plu havis halucinojn. Parenteze, dum la malsanuleja restado, li menciis al la neŭrologo, ke tiu sperto rememorigis al li libron es-

tintece legitan de li pri la esploristo Ernest Shackleton, kiu rakontis, ke, dum terura vojaĝo sur la fora arkipelago Sud-Georgio, li imagis esti akompanata de homo, kiu fakte ne ekzistis.

## Alpisto kaj fantomo

Similan sperton menciis Edmond Hillary, monto-grimpisto, sur monto Everest. Li mem rakontis, ke dum sia supreniro ankaŭ li supozis, ke li havas kunulon. Tiom vigla estis tiu „fantomo”, ke la alpisto etendis manon por proponi energidonan kukon al la supozata individuo. Verŝajne analo-

gan sperton travivis ankaŭ la hispana poeto Antonio Machado, kiu en sia poemo *Retrato* skribas: „*Converso con el hombre que siempre va conmigo ...*” (Mi konversacias kun la homo, kiu ĉiam iras kun mi ...).

## Triavira faktoro

En la angla lingvo estas speciala termino por priskribi tiun fenomenon. Ĝi nomiĝas *third man factor* (aŭ *symptom*), do „Triavira faktoro/simptom”. Estus interese scii, ĉu alia leganto spertis iam la saman fenomenon kaj kapablas klarigi ĝin iamaniere. ■



Kontribuojn por la rubriko  
Scienco de MONATO  
kunlaborantoj sendu  
al [scienco@monato.be](mailto:scienco@monato.be).




## FUTBALO

# Kataro: ruĝa karto



**Tommaso MELACOTTE**  
korespondanto de MONATO en Italio



*Sportjurnalisto  
Valerio Moggia: „Jam  
de longe Kataro strebas  
sendependiĝi de la naturfontoj,  
per intensiva investado en la  
okcidenta financa sektoro  
kaj per turismo.”*

**V**alerio Moggia kunlaboras kun pluraj gazetoj kaj revuoj en la mondo de sporta ĵurnalismo kaj okupiĝas pri la rilatoj inter futbalo, politiko, socio kaj aŭtoraj rajtoj. Li komencis sian agadon en 2017 per sia blogo *Pallionate in Faccia* (Pilkofrapoj en la vizaĝo). Lia unua libro *Storia Popolare del Calcio* (Populara historio de futbalo) estis eldonita en 2020 kaj sekvas sian fluon inter sporto, politiko kaj socio.

Lia lasta libro, *La Coppa del Morto* (La pokalo de la morto), estas enketo pri la Futbala Mondpokalo 2022, gastigita en Kataro,

malantaŭ la kulisoj de la internacia kaj loka sportnecigo. Pro la trarigardo de unu el la plej kreskegantaj ŝtatoj de la Persa Golfo, ĉi tiu verko estas unikaĵo inter la italaj eldonaĵoj pri futbalo. Kun la celo klarigi la fundamentojn de ĉi tiu ĉampionado, Moggia realigas analizon, kiu etendiĝas ĝis la origino de la katara regadsistemo kaj la dependeco de futbalo de la mono de la ŝtatoj de la Persa Golfo.

MONATO intervjuis Valerio Moggia tuj antaŭ la ĉi-jaraj ludoj:

**MONATO:** *Ĉu vi volas komenci pri la aktuala situacio en Kataro?*

**Moggia:** Estas iom malfacile resumi tiel multaspektan temon, sed mi povas skizi suman kadron. Kataro estas absoluta monarkio kun ege konservativa socia vidperspektivo. Ĝi estas nana sed riĉega ŝtato – danke al tergaso – kun

malgranda privilegia klaso kaj pli ol du milionoj da enmigrintaj laboristoj. Jam de longe ĝiaj regantoj strebas sendependiĝi de la naturfontoj, per intensiva investado en la okcidenta financa sektoro kaj per turismo. Samtempe ĝi devas sin protekti kontraŭ la influoj de la najbaraj landoj, precipe Sauda Arabio. Tia ĉi estas



*La Coppa del Morto (La pokalo de la morto) surprizas per sia detala kaj aktivada enketo en tiu ĉi diskutata Mondpokalo. Ekde la stato de la laboristoj ĝis la geopolitikaj kialoj kaj celoj malantaŭ sporta superregado, Moggia rakontas pri la interligiteco de futbalo, rajtoj kaj ekonomio per lucideco kaj konscienco malofte vidataj en sportaj eldonaĵoj en Italio.*

la kunteksto de la lando, kiu gastigos la mondan futbalan ĉampionadon kaj ĉio, kio el ĝi devenas: ekspluatado de la laboristoj, malobservo de la virinaj rajtoj kaj de la GLATKI+-komunumo<sup>1</sup> kaj la impona armilalfluo.

**MONATO:** *De Kataro ĝis Italio, kio estas la ligiteco inter futbalo, negocoj, mono kaj politiko dum tiaj enormaj amaseventoj?*

**Moggia:** Futbalo estas unu el la plej popularaj sportoj. Do ĝi ankaŭ estas la plej bona ilo por interveni en la ekonomioj de aliaj landoj. La kialoj estas pluraj. Nuntempe, inter Kataro kaj

Sauda Arabio estas granda geopolitika konflikto, kiu okazas ankaŭ en la eŭropaj futbalkampoj, kie tiuj landoj – kune kun Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj – posedas lokajn teamojn. Same pri la ĉampionadoj: dum Kataro akiris la Mondpokalon, Sauda Arabio jam posedas de longe la italan kaj hispanan superpokalojn. En Italio, la Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj lastatempe akiris Palermon FC, kaj dum kelkaj tagoj oni parolis pri akiro de Sampdoria Genova. Italio havas multajn ekonomiajn problemojn, ankaŭ je futbala nivelo, do ĝi bezonas gravajn investantojn. Futbalo estas unu el la iloj per kiuj nia lando klopodas ekigi rilatojn kun la monarkioj de la Persa Golfo: aljuĝo de la Superpokalo, forcedo de la televidrajtoj pri Serio A al la mez-orienta areo kaj sendo

de milita dungitaro por la Mondpokalo.

**MONATO:** *Do, la Mondpokalo estas artifiko por relanĉi la popularecon kaj la komercon de landoj?*

**Moggia:** Kompreneble. Kataro klopodas nun ekspluati la Mondpokalon por igi sian ĉefurbon Daŭho nova kaj fokusa turismo-centro, kiel la najbara Dubajo, kvankam – malsame ol la Arabaj Emirlandoj – ĝia konservativa inklino malfaciligas la kunpuŝiĝon inter la okcidenta turismo kaj la loka kulturo. Krome, Sauda Arabio kaj Kataro estas esence rivalaj landoj, kaj ĉi tiu antagonismo ege kontribuas intensigi ĉi tian turisman kaj ekonomian konkurencadon inter ili kaj inter la najbaraj ŝtatoj.

**MONATO:** *Inter la plej pezaj sciigoj estas la stato de la laboristoj. Kiuj estas la nombroj, ankoraŭ ne konfirmitaj, malantaŭ ĉi tiu sistema amasekspluato?*

**Moggia:** Bonŝance, pluraj enketoj – ĉiuj eksterlandaj – estas realigitaj pri ĉi tiuj temoj. En la raportoj de ne-registaraj organizaĵoj kiel Amnestio Internacia kaj en la esplorado de kelkaj ĵurnaloj kiel la brita *The Guardian*, specifaj informoj estas delonge disponeblaj al la publiko. La diskuto restas tamen tre malsimpla. Kiel vi diris, ni ne konas la ekzaktan nombron de la viktimoj kaj eble ni neniam malkovros ĝin. Estas preskaŭ nefareble identigi kun certeco

la homojn, kiuj mortis „pro” la Mondpokalo: kelkaj sin mortigis pro la teruraj vivkondiĉoj; kelkaj mortis pro infarkto en siaj litoj post masakraj deĵortempoj sub la suno kaj sen akvo; kelkaj mortis pro elektrokutiĝo, ĉar en la kaduka provizita apartamento estis sekurecproblemoj. Kataro facile povas aserti, ke neniu morto rilatas al la realigo de la konstruaĵoj por la Mondpokalo. Mi diras nur, ke estis miloj da mortoj pli aŭ malpli rilataj al ĉi tiu evento, sed la reala problemoj jam ekzistis: la laboristoj tie ĉiam estis ekspluatataj horore kaj ne necesas tragikaj hazardoj por indigniĝi.

**MONATO:** *Laŭ via sperto kiel sporta ĵurnalista, kiun percepton la futbala kaj sporta mondo en Italio havis pri ĉi tiu Mondpokalo?*

**Moggia:** Unue, estas necese substreki, ke Italio estis unu el la landoj en kiuj ĉi tiu monda ĉampionado estis malpli traktata. Amaskomunikiloj, institucioj kaj futbalistoj preskaŭ ne parolis pri ĝi, kaj komencis nur dum la lastaj semajnoj antaŭ la inaŭguro. Tio estas problemoj ne nur de ĉi tiu specifa Mondpokalo – en kiu nia nacia teamo ne partoprenis – sed precipe rilatas al la facilanima maniero per kiu ni rigardas la rilaton inter futbalo kaj politiko. Mi pensas ke, kiel socio, ni ĉiuj devus pensi pri ĉi tiuj malfacilaĵoj, kiuj povas havi pezajn politikajn konsekvencojn. ■

1. GLAT (ankaŭ anglalingve LGBT kaj GLBT) estas akronimo, kiu nomas la komunumon de gejoj, lesbaninoj, ambaŭseksemuloj kaj transgenuloj. La akronimon oni povas renkonti ankaŭ en varianto kun aldonaj literoj: GLATKI+ (angle plej ofte LGBTQ kaj GLBTQ).

## EGIPTIO

# Ne tute mortis la antikva egipta lingvo



Michał LABENDA  
Egiptio

La egipta lingvo, antaŭ jarcentoj malaperinta, apartenas al la afrik-azia lingvaro, enkadre de kiu ĝi reprezentas apartan branĉon, kie ĝi estas la sola membro. Tio signifas, ke, malgraŭ la longa tempa distanco inter ili, la egipta lingvo ja rilatas al la araba (kiu estas la nuna oficiala lingvo en Egiptio), kvankam ilia „parenceco” estas tre malproksima kaj apenaŭ travebla. La historio de la egipta lingvo estas vastega: ĝi ekas per la plej malnova lingvo de la 32a jarcento a.K., kiun sekvis la klasika mez-egipta de la 19a jarcento a.K., siavice antaŭulo de la nov-egipta kaj de la kopta, kiu definitive malaperis kiel vivanta lingvo en la 13a jarcento p.K.

**N**i ofte rigardas la egiptajn kulturon kaj lingvon kiel unuecan neŝanĝiĝeman eron, sed tio ne veras. La fama Kleopatro, kiu vivis en la 1a jarcento a.K., povus facile konversacii kun la nuna papo Francisko, ĉar ambaŭ povus uzi la latinan. Tamen kun Ĥufu, la konstruiginto de la fama piramido, kiu vivis en la 26a jarcento a.K., tio nepre ne estus ebla. En la 7a jarcento p.K. islamanoj konkeris tutan Egiption kaj, iom post iom, anstataŭigis kristanisman per islamo, lokajn regantojn per aliuloj alvenintaj el la araba duoninsulo kaj la koptan lingvon per la araba, kiu eĉ enkondukis sin en la kristanan liturgion.

## Terkultivado

Oni diras, ke Egiptio estas donaco de Nilo. Tio estas vera, ĉar en Egiptio

preskaŭ neniam pluvas, tial loĝeblaj lokoj kuŝas nur en la mallarĝa zono apud la granda rivero kaj en ĝia delto, kie la nila akvo estas alirebla kaj atingebla. Okcidente kaj oriente de la loĝebla areo troviĝas dezertoj, netraireblaj kaj malamikaj. Malsame al aliaj popoloj, la egipta nacio neniam spertis grandajn migrajn ondojn, kaj el genetika vidpunkto la plimulto de la hodiaŭa popolo en egiptaj vilaĝoj kaj urboj estas rektaj posteuloj de la antikvaj egiptoj. Fakte la egiptoj tiam perdis sian lingvon, sed dum la periodo de malrapida arabigado multaj vortoj daŭre estis uzataj, riĉigante la novan lingvon kaj donante al ĝi pli rafinitan, lokan guston.

La politikaj kaj sociaj ŝanĝoj do ne tuŝis profunde la multjarcentan konscion kaj mondopercepton de la loka loĝantaro. Esprimoj kaj metaforoj enradikiĝ-

intaj en la egiptaj medio kaj socio estis rekte tradukitaj de la kopta al la araba. Kompreneble ĉi tiu fenomeno estis pli forta en la fortresoj kaj bastionoj de pli tradicia vivmaniero, kie iuj aferoj ripetiĝas senŝanĝe jam de jarmiloj. Oni sekve trovas multajn koptodevenajn vortojn precipe en vilaĝoj, en la fako de terkultivado kaj en familiaj interparoladoj.

## Suzano

La unua, tre riĉa, fonto de antikvaj vortoj en la nuna egipta dialekto de la araba lingvo estas personaj nomoj. Egiptaj kristanoj ofte uzas nomojn, kiujn iliaj antaŭuloj donis al siaj idoj antaŭ kvar, kvin aŭ ses jarmiloj: Banub (apartenanta al Anubo, dio de sepultejoj kaj mumiiĝado), Baĥur (apartenanta al Horuso, filo de la plejalta egipta dio Oziriso), Bajumi (iu el la rivero), Ŝarabi aŭ Ŝirbi (la unuenaskito),



OLEKSANDRA KLESTOVA / SHUTTERSTOCK.COM

Ĝamĝum (la fortulo), Suna (la fratino), Dosa (la diino Iziso). Eble legantoj aŭdis pri la antaŭa kopta papo Ŝenuda, kies nomo signifis en la kopta „la dio vivas”. Alian nomon oni preskaŭ certe konas en sia denaska lingvo. Angla Susan, araba Saŭsan, hungara Zsuzsa, pola Zuzanna, skandinava kaj itala Susanna, eĉ kartvela Ŝuŝanik, greka Suzana kaj bulgara Suska: ĉiuj tiuj nomoj devenas de la egipta radiko *s-š-n*, uzata por indiki lotuson (bedaŭrinde la egiptaj hieroglifoj ne konis vokalojn, pro kio ne eblas al ni rekonstrui la plenan kaj ĝustan iaman prononcon de la vorto).

La dua abunda fonto de plej antikvaj egiptaj vortoj estas kuirado. Ne-egiptaj arab-parolantoj ne rekonas la lokajn vortojn por pano (*battaŭ*), fromaĝo (*ĥalum*) aŭ rapo (*lift*). Cetere en urboj kaj en kamparoj ĉiuj manĝas sekalan panon, kiun hodiaŭaj bakistoj preparas ĝuste tiel, kiel iamaj egiptaj panbakantoj en la tendaroj de piramidkonstruantoj. La nomo estas ja la sama: *sinn*. Ne ekzistas aliflanke egipta matenmanĝo sen *ful*, malrapide kuirita sekigita fabo kun diversaj aldonajoj.

Ĉar viando tre malofte aperis sur la tabloj de vilaĝaj hejmoj, la plej ofta manĝaĵo estis *koŝeri*, t.e. miksaĵo de pastaĵo, rizaĵo, brunaj lentoj kun pecoj de fritita cepo kaj tomata saŭco. Ofte, kiel deserton, egiptoj havas la bongustan

mielĉokoladon *ka'k*, pura malnov-egipta nomo.

## Netrovebla penis

Ankaŭ multaj lokaj Nilfiŝoj nomiĝas laŭ antikvaj egiptaj nomoj: *ŝilba* por sparedo, *buri* por mugilo, *ramrum* por tilapio. Ĝis nun la araba nomo de la nila siluro, *karmut*, estas uzata kiel eŭfemismo por penis. Kial? Post kiam Setho, la dio de la dezerto, mortigis sian fraton Ozirison, kaj tranĉis lian korpon, kaj disjetis korpopecojn al diversaj lokoj de la lando, la dia fratino (kaj edzino de Oziriso) rekolektis liajn korpopartojn escepte de la penis, kiun ŝi ne trovis, ĉar ĝin manĝis siluro. Ĉi tie ne la nomo, sed la analogio, venis al ni de tre antikva epoko. Eĉ pli interesa afero ligiĝas kun la kalendaro. La malnova egipta kalendaro, kiu kompreneble koncentriĝis sur Nilo kaj agrikulturo, havis tri sezonojn (la Inundon, la Kreskadon kaj la Rikolton): ĉiu sezono havis siavice kvar monatojn. La homoj plibonigis ĉi tiun kalendaron dum multaj jarcentoj, post kio ĝi perfekte taŭgis kaj daŭre taŭgas por la bona vilaĝa vivo.

La monatonomoj mem formiĝis en malnova Egiptio kaj supervivis la kristanan kaj islaman epokojn ĝis nun, spite al tio, ke ili honoras kaj omaĝas la malnovajn diojn. Ili estas Tut, la monato de Tuto, dio de la saĝeco; Hatur, la monato de

Hatoro, diino de la patrino; Koiak, la monato de la sankta taŭro Apiso; Tuba, la monato de la plejalta sun-dio Ra ktp. Hodiaŭ tiu ĉi kalendaro ne estas nur folkloro, sed parto de la tradicio: io, kion oni studas en lernejo. Temas pri la aktuala tempokalkula sistemo, uzata en ĉiutagaj vilaĝaj agadoj.

## Noktokorvo

La praa egipta lingvo vivas ankaŭ en esprimoj, popolaj maksimumoj kaj frostiĝintaj frazoj. Al iu, kiu ne plenumas siajn taskojn, oni povus diri *hob, hob, ja ŝugl an-nob* („laboru, laboru, la laboro estas oro”). Ne-egipta arab-parolanto ne komprenus ĉi tiun esprimon, ĉar la vortoj *hob* kaj *nob* venas rekte de la malnova lingvo de Egiptio. Al malrapida laboranto oni diru *ŝika-bika* („finu kaj prenu vian salajron”): *ŝika* estis „fini” en la egipta, kaj *bika* „ricevi pagon” (antikva Egiptio estis senmona ekonomio).

Kiam infano faras siajn unuajn paŝojn, la gepatroj vigligas ĝin, dirante *ĥaba, ĥaba*, kio signifas en la egipta lingvo „paŝu, paŝu”. Sed patrino, kiun lacigis senfinaj demandoj de la infanoj, povas diri al ili *gaj maŭ* („la leono venos”, por manĝi ilin, kompreneble), kie *maŭ* estas aŭtentika malnov-egipta vorto por leono. Ekstiminta egipto krias *Bih!*, la malnov-egiptan vorton por demono, aŭ *ja baj*, la nok-

tokorvon, kiun la egipta popolo timegis ĉiam.

Bongusta dolĉaĵo estas kuirata aŭ bakata *kani-ŭa-mani*, t.e. kun butero kaj mielo, kaj temas ankorufoje pri populara kopta esprimo. Pri nekutima, mirinda aŭ eksterordinara aĵo, male, egipta virino dirus *iŝbar alejk*: la unua vorto en la faraona lingvo signifas „la miraklo”, dum la dua en la araba signifas „por vi”.

## Enŝoviĝo

Volando, en la romano *La majstro kaj Margarita* de la rusa verkisto Miĥail Bulgakov, diras, ke manuskriptoj ne brulas. Same oni povas diri, ke lingvoj ne pereas. La praegipta lingvo ne tute ĉesis ekzisti, kaj ĝiaj riĉeco kaj beleco ja enŝoviĝis ie-tie en la modernan egiptan dialekton de la araba lingvo. ■



**Michał Łabenda** estas pola oficisto kun sperto en mez-aziaj kaj mez-orientaj landoj, esploristo pri la kulturo, historio kaj lingvoj de la mez-aziaj nacioj.

## EŬSKIO

# Bronza mano prilumas la praeŭskan lingvon



Albert CLARET  
Katalunio

La estinteco de la eŭska ne estas tute klara, kaj lingvistoj konsideras ĝin „antaŭindeŭropa izolita lingvo” sen rilato al iu hodiaŭa lingvofamilio. Oni eĉ ne scias certece, kie ĝi aŭ ĝia praulo estis parolata dum la antikveco, ĉar el tiu epoko estas malmultaj skribaĵoj, kiuj helpas tion scii. Tiu ĉi situacio tamen ŝajne ekŝanĝiĝis kaŭze de freŝa arkeologia trovaĵo fare de la eŭska Scienca Societo Aranzadi. La malkovro okazis en 2021 sed diskoniĝis en novembro 2022.



ARGIA

## Plej antikva spuro de la praeŭska lingvo

Dum esplorado de monto Irulegi, ĉe la valo de Aranguren apud la urbo Pamplono en Navaro (hispan-ŝtata Eŭskio), la sciencistoj malkovris ion neku-

timan kaj ege mirindan: manforman bronзан lame-ton, datiĝantan de la 1a jarcento a.K. Sur ĝia surfaco troviĝas gravuritaj enskribaĵoj, kiuj formas kvar liniojn laŭ loka varianto de la ibera skribsistemo. Lingvistoj sukcese transskribis la tutan

tekston, kaj ili multe surpriziĝis, ĉar la unua vorto estas *sorioneku*, kiun facilege oni povas rekonduki al la moderna eŭska *zorioneko*, t.e. „bonŝanca”.

Kvankam la ceterajn vortojn bedaŭrinde oni ankoraŭ ne sukcesis malĉi-

fri, tiu malkovraĵo speciale gravas pro du kialoj. Unue, ĝi verŝajne konfirmas, ke la praeŭska lingvo – nomata ankaŭ „vaskona” – estis efektive parolata en la nuna teritorio de Navaro antaŭ pli ol du jarmiloj. Due, ĝi certigas, ke la praeŭskoj

La malkovraĵo certigas, ke la praeŭskoj kapablis legi kaj skribi antaŭ la alveno de romianoj, kaj ke ili havis sian propran skribsistemon, adaptitan el la ibera.

kapablis legi kaj skribi antaŭ la alveno de romianoj, kaj ke ili havis sian propran skribsistemon, adaptitan el la ibera.

## Detaloj kaj historia kunteksto

La „Mano de Irulegi” estas farita el bronzo, kun miksmetala patino el stano, kupro kaj plumbo, kaj pezas nur 36 gramojn. Ĝi aperis ĉe la enirejo de ruina domo, kaj la hipotezo de la spertuloj estas, ke tiu bela, vivgranda kaj renversita dekstra mano estas rita amuleto, kiun oni pendigis aŭ najlis sur ligna kadro ekstere de la hejmo por repeli malbonon kaj protekti la loĝantojn.

La arkeologia kuŝejo situas en la supro de la monto Irulegi kaj ĉe la bazo de la samnoma kastelo. Tie troviĝis setlejo de la meza bronzepoko ĝis la sertoriaj militoj (83-73 a.K.), sed ĝi estis forlasita post kiam la romiaj soldatoj bruligis la tutan vilaĝon. La muroj de la domoj tiam falis kaj kovris la enajn objektojn,

konservante ilin. Tial tiu loko multe gravas, ĉar ĝi montras „frostigitan bildon” de tiu specifa epoko. Krom la jam tre faman manon, tie oni trovis bone konserviĝintajn ceramikaĵojn kaj ĉiutagajn objektojn.

## Demandoj sen respondo

Sendube, la „Mano de Irulegi” jam helpis la esploristojn iom pliklarigi la pasintecon de la eŭska lingvo kaj de la praeŭskaj popoloj, sed ankoraŭ estas multaj demandoj sen respondo, tiel ke misteroj plu daŭras. Kion signifis la ceteraj enskribitaj vortoj? Ĉu ankaŭ ili estas en la praeŭska aŭ en la ibera? Ĉu la objekto estis dediĉita al konkreta dio aŭ diaĵo? Eble, danke al la senlaca laboro de la fakuloj, ni baldaŭ akiros pli da konoj koncerne ĝiajn historion kaj celon. ■

# Matematika inspiro, sed mallerta satiro

Edmund GRIMLEY EVANS

Mi aŭdis pri ĉi tiu romano jam antaŭ longe, verŝajne ĉar Martin Gardner, aŭ alia aŭtoro pri distra matematiko, menciis ĝin. La rakontanto de la romano estas kvadrato, loĝanto de dudimensia mondo, „Platlando”. Tiu kvadrato tamen spertas, vizie aŭ vizite, mondojn kun aliaj nombroj de dimensioj: nian propran tridimensian mondon, kiun li nomas „Spacolando”, kaj al kies loĝantoj la romano estas adresita; la unudimensian „Linilandon”; kaj li vojaĝas „eĉ al la regno de Punktlando, la Abismo de Neniu Dimensio”. Poste li konjektas la ekziston de „lando de Kvar Dimensioj”, kaj landoj kun eĉ pli multaj dimensioj. Sed la tridimensia Sfero, al kiu li prezentas siajn konjektojn, koleriĝas kaj rejetas lin en la dudimensian mondon.

La koncepto ŝajnas amuza, kaj oni facile komprenas, kiel ĝi plaĉas al matematikistoj, sed kiel oni faris tutan romanon el tia koncepto? Nu, ĉefe per multaj detaloj pri la vivo en Platlando, ekzemple pri la diversaj sociaj klasoj, kiuj havas diversajn nombrojn de lateroj, de la triangulaj metiistoj kaj soldatoj ĝis la multflankaj nobeloj kaj la plej alta kasto, la cirkloj, kiuj estas pastroj. Dume la virinoj estas nur rektaj linioj, kaj danĝeraj pro sia akreco. Estas ĉapitroj ankaŭ pri „niaj metodoj rekoni unu la alian”, ekzemple per „sentado” (estu „palpado”), kaj „rekonado per vidado”, malfacila sed nobla arto. Multaj tiaj teknikaĵoj estas klarigitaj per diagramoj en la libro.

## Kion oni satiras?

Laŭ la dorsa teksto, la romano estas „delikaĵo por ŝatantoj de matematiko, pli



Baldaŭ reaperos la fama humura kolekto

*Fabeloj de la verda pigo*

kolektitaj de Louis Beaucaire

Sekvu la detalojn en [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be)

precize geometrio, sed samtempe ĝi estas satiro, kiu kritikas la socian hierarkion en la viktoria [tiel] epoko en kiu Abbott vivis". Tamen ne estas multe da vera matematiko en la libro. Verŝajne la plej matematika parto estas tiu, en kiu la Kvadrato parolas pri landoj kun pli multaj dimensioj kaj kalkulas la nombron de „limkuboj" de la kvardimensia analogo de kubo. Ŝajne enestas multe pli da satiro ol da matematiko, sed la satiro estas ... malfacile komprenebla. Okazas brutala subpremo de „Kromata Ribelo", sed al mi ne estas klare, kion precize oni tiel satiras. Oni detruas infanojn, kies anguloj ne estas sufiĉe egalaj. Ĉu okazis io simila en la Anglio de la 19a jarcento? Virinoj estas priskribataj kiel stultaj: iuj soldatoj estas „estajoj preskaŭ sur la sama nivelo kiel Virinoj en sia manko de inteligenteco".

Mi demandis min, ĉu la satiro estas al mi malfacile komprenebla nur pro la socia distanco: kvankam la aŭtoro studis en la sama kembriĝa kolegio kiel mi, li naskiĝis en 1838, do

edukiĝis en alia epoko, kva-zaŭ en fremda lando, kaj la romano unue aperis en 1884. Tamen, kelkajn eĉ pli malnovajn anglajn satirojn mi pli facile aprezas, kaj mi notas la longan antaŭparolon al „la dua kaj reviziita eldono, 1884", en kiu la „redaktisto" klarigas interalie, ke la Kvadrato „sin identigis (probable tro firme) kun la opinioj ĝenerale adoptitaj de Platlandaj, kaj (kiel oni lin informis) eĉ tiuj de Spacolandaj Historiistoj". Legante tion, oni divenas, ke ankaŭ la tiutempaj legantoj ne tre facile aprezis la satiron.

### Diversaj tradukoj

Bedaŭrinde, la traduko ne estas tre bona. Enestas multaj mistradukoj ŝajne pro angla influo, ekzemple (kun pli normala esprimo en parentezo): provi (pruvi); cent kaj dudek (cent dudek); akurate (precize); apologiis (pardonpetis); kuriozecon (scivolemon); utiligis agojn (sin turnis al agoj); Gospelo (Evangelio); mensa vizio (mensvido). Enestas ankaŭ

malĝustaj refleksivoj, kaj ŝajne ĉiuj participoj, kiuj devus finiĝi per „-ata", finiĝas anstataŭe per „-ita".

Verkante ĉi tiun recenzon, mi iom serĉis en la reto kaj malkovris strangan aferon: jam ekzistas alia traduko de ĉi tiu libro („Tradukis el la angla Thomas JAMES") legebla ĉe <http://www.zz9pza.net/tradukoj/platlando/>. Mankas dato en tiu retpaĝo, sed laŭ archive.org la paĝo ekzistas de la 8a de decembro 2013. Strange, ke ni ŝajnas havi eĉ du tradukojn en Esperanto de ĉi tiu verko ne tiel famega. Mi ne sufiĉe studis la tradukon de Thomas James por prijuĝi ĝian kvaliton, sed la parentezaj alternativoj en la antaŭa alineo estas cititaj el tiu traduko, do ĝi ŝajnas pli bona almenaŭ en tiuj lokoj.

Temas pri unika verko, interesa por kelkaj homoj: leginte diversajn komentojn en la reto pri la angla originalo, mi havas la impreson, ke la verko eĉ tre plaĉas al iuj homoj. Tamen, mi ne rekomendus ĝin por ĉiu ajn, kaj la traduko de Hu Shenghao estas plibonigebla. ■



**La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL**

Lange Beeldekensstraat 169,  
B-2060 Antwerpen,  
Belgio.  
tlf. + 32 3 234 34 00  
rete: [retbutiko@retbutiko.be](mailto:retbutiko@retbutiko.be)  
skajpe fel-monato  
[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be)



Edwin Abbott Abbott: *Platlando: romano de multaj dimensioj*.  
Tr. Hu Shenghao. Eld. Libera, 2022. 146 paĝoj.  
ISBN 978-1-4716-5385-8.



LA GRAFO DE

# MONTE- KRISTO

**La vivoverko de  
Alexandre Dumas kaj  
la vivoverko de tradukisto Daniel Moirand**

Oni kutimas konsideri la libron La Grafo de Monte-Kristo kiel la ĉefverkon de A. Dumas. Ĝi estas vere fascina. Ĉiu plia (re) legado ebligas trovi ion novan, novan interpretadon, novan aspekton ...

La ĉefrolanto, Edmond Dantès, perfidita pro kalumnia denunco, estas enkarcerigita dum dek kvar jaroj en la malliberejo de la kastelo If, sur insuleto apud Marsejlo. Tie li koniĝas kaj amikiĝas kun sammalliberejano, abato Faria, kiu transdonas al li la sekreton pri la loko de kaŝita trezoro. Post lia forfuĝo el la malliberejo kaj rekupero de la trezoro, la strebo de lia tuta vivo, danke al supera riĉeco kaj inteligenteco, estas venĝi sin kontraŭ tiuj, kiuj atencis lian junecon, lian feliĉon.

A. DUMAS



LA GRAFO DE  
**MONTE-  
KRISTO**

FEL

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio (en 2 volumoj): formato 135 x 210 mm, pezo 1333 g, 1184 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-43-0; prezo ĉe FEL: 96 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 28 EUR